# LA MALLARĜA VOJO

N-ro 1 / 2017
9-a jaro

Temo:

**Reformacio niatempe**
**1517 - 2017**
**Novaj 95 tezoj por la nuntempo**

*Biblia citaĵo:*
*Pentu, ĉar la regno de la ĉielo alproksimiĝis!*
*Mateo 4,17*



**Eldonas:**
Christlicher Gemeinde-Dienst (CGD)
Verein zur Förderung christlicher Werke und Gemeinden Pforzheim e.V.
Emailo: info@cgd-online.de
Hejmepaĝo: www.cgd-online.de

**Sekretario** (redaktaj kontribuoj)**:**
D-ro Lothar Gassmann
Am Waldsaum 39
D-75175 Pforzheim
Tel. (AB) 07231-66529
Faksilo 07231-4244067
Emailo: Logass1@t-online.de
Hejmpaĝo: www.L-Gassmann.de

Kompostaĵo kaj fotoj: Lothar Gassmann
Titolfoto: Mahnwachen und Thesenschlag
Kovrilpaĝo: Werner Fürstberger
Presado: Druckmaxx, Blekendorf

Por la nome signitaj kontribuaĵoj la enhavan respondecon portas la koncerna aŭtoro. Ĉiuj kontribuoj en tiu ĉi kajero – se ne estas difinite alimaniere, rajtas esti senŝanĝe kaj provizite per la fontmencio esti kopiataj, represataj kaj tradukataj en aliajn lingvojn. Ni petas specimenon al la adreso de nia buroo. Koran dankon!

**CGD-Buroo**
(Distribuo, konfirmiloj por la dediĉitaj monsendaĵoj):
Thomas Ebert, Alemannenstr. 5
D-75038 Oberderdingen
Tel. 07258-295452
Emailo: info@cgd-online.de

Donackontoj
Germanio:
Sparkasse Pforzheim-Calw
Christl. Gemeinde-Dienst Pforzheim
IBAN: DE89 6665 0085 0007 2389 67
BIC oder SWIFT: PZHSDE66

Aŭstrio:
Raiffeisenbank Leiblachtal
Christl. Gemeinde-Dienst Pforzheim
IBAN: AT07 3743 9000 0380 8045
BIC: RVVGAT2B439

Svisio:
Die Schweizerische Post:
Christlicher Gemeinde-Dienst Pforzheim
Verein zur Förderung christlicher Werke und Gemeinden e.V.
DE-75175 Pforzheim
IBAN: CH32 0900 0000 6074 9747 5
BIC: POFICHBEXXX

La revuo DER SCHMALE WEG estas sendata surbaze de donacoj al la interesitoj (abonkostoj pojare 15,- € enkl. sedndkostoj). La konstoj estas kovrataj ekskluzive per propravolaj dediĉoj (donacoj) fare de legantoj. Ni dankas, se vi nin helpas!

La CGD estas rekonita kiel la ĝenerale utila organizaĵo. La donacoj estas ĝis 20 % liberigitaj de impostoj, deprenite de la jarenkasigoj. **Ni petas, ke vi okaze de la monsendaĵo aldonu vian poŝtkodon kaj la numeron de via „amikeco“.** Tiun vi trovas en la adreskadro sur la dorsopaĝo. Koran dankon!

# Kara leganto!

Marteno Lutero turnus sin en la tombo, se li povus vidi, kio estiĝis el „lia“ Evangelische Kirche (Evangelia Eklezio) en multaj ŝtatoj. La slogano „500 jaroj de la reformacio“ iĝis spektaklo kaj farso, sed ne renovigita konvertiĝo, kiun la evangelia eklezio tiel bezonas. Ni ĉe tiu ĉi spektaklo ne kooperacias, sed invitas – ankaŭ ankoraŭ en tiu ĉi fina tempo – al nova pentomovado: al nova reformacio.

Helpon por tio oni povas trovi en novaj 95 tezoj, kiuj cetere estiĝis jam en la „jaro de Lutero“ 1996 okaze de la 450-a datreveno de lia morto, sed ili dume nenion perdis de sia fajra aktualeco. Tial ni disponigas ilin okaze de la reformacia jubileo en la jaro 2017 denove al diskuto kaj ni preĝas por larĝa disvastigo. Vi trovas la 95 tezojn en la meza folio de tiu ĉi kajero. Ili estas akireblaj ankaŭ kiel separa presaĵo en formatoj DIN A5 kaj A4 (kiel bazo por fotokopii) ĉe nia buroo kaj vi povas tie postuli la bezonatan kvanton surbaze de donaco.

Jam en Oktobro 1996 okazis kongreso kun la temo „La reformacio nuntempe“ en Berlino kaj aldone okazis fiksado de la tezoj en Vitenbergo, kie partoprenis ĉirkaŭ 600 kredantoj. El tiu evento ni publicas en tiu ĉi eldonaĵo kelkajn referaĵojn kaj fotojn el la bedaŭrinde jam plene disvendita kongresa kajero „Ruf zur Umkehr“ (Alvoko al konvertiĝo) nove. Kiel enkondukan penson mi ĉi tie publicas la alparolon, kiun mi tiam post la fiksado de la novaj 95 tezoj diris antaŭ la kastelpreĝejo en Vitenbergo:

***„Reformacio nuntempe“* – tio estas granda pretendo kaj riska entrepreno – kaj tamen pli nepra ol iam ajn.** Permesu min do diri ion pri la motivo, estiĝo kaj celo de la novaj „95 tezoj konfronte al la situacio de la eklezio kaj de la socio“.

La *motivo* estas konata: Multo en la eklezio kaj socio troviĝas en fiasko. La vorto de Dio larĝskale ne plu estas prenita serioze – nek instrue nek vivmaniere. La kritiko de la Biblio preparis la vojon por la tempospirito. La ordonoj de Dio estas en la eklezio kaj en la socio en multaj ŝtatoj de la tero nuligitaj. La diskutoj pri la blasfemado, abortado, eŭtanasio, homoseksuala praktiko, libera disdono de drogaĉoj kaj similo, kiel oni niatempe tion travivas, estus antaŭ nemultaj jaroj ankoraŭ neimageblaj. Oni estus tre tre konsternita kaj oni sentus honton. Ankaŭ la religia intermiksado kaj same la partopreno de la tiel nomataj evangeliaj kristanoj ĉe la paganaj ritoj de fremdaj religioj kaj aliaj konfesioj kreskas.

En tiu ĉi situacio – tiel pensas pli ol 30 kristanaj organizaĵoj, kiuj subskribis la novajn 95 tezojn kaj ilin eldonis – estas reformacio, renoviĝo samtiel nepra kie en la jaro *1517*. Ankaŭ tiam la eklezio – la rom-katolika eklezio – estis mondiĝinta. Nuntempe tiu mondiĝo multajn protestantajn ekleziojn eĉ pli forte trafis ol tiam estis la kazo ĉe la romkatolika eklezio. Se la katolika eklezio tiam anoncis la indulgencojn kiel la malmultekostan gracon, anoncas nuntempe multaj eklezioj la nuligon de la ordonoj de Dio kiel la eĉ pli malmultekostan gracon. Se tiam aŭdiĝis la slogano „Kiam penco en la kaso sonas, la animo el purgatorio saltas“, niatage tamen la slogano estas: „Ĉio permesata – kaj de l´ eklezio tuj benata.“

Tio ne rajtas daŭriĝi tiel! Tial estis faritaj la novaj 95 tezoj – ilia unua redakto okazis precize la 18-an de Februaro 1996, okaze de la 450-a datreveno de la morto de la reformatoro Marteno Lutero, en Germanio. Pluraj kristanoj de diversaj naciecoj kaj haŭtkoloroj helpis kune ilin finpretigi en la nuna formo – nome, en ĝis nun 20 lingvoj, tradukitaj post nemultaj monatoj. Aldonaj tradukoj estas en preparo. (*Aldona notaĵo 2017: Fine de la jaro 1996 jam troviĝis 30 tradukoj. La momenta nombro al mi ne estas jam konata*.)

La novaj 95 tezoj estas alfiksitaj. La voko por konvertiĝi estas proklamita. Nun la adresitoj havas vicon respondi – ne nur en Germanio, sed en pli ol 100 ŝtatoj de la tero, en kiuj la tezoj ĝis nun estis disvastigitaj. Kiu estas la adresitoj? Kiuj estas alparolitaj?



La adresitoj unue estas *ni mem*, ĉiu el ni. Por ĉiu unuopa homo validas la alvoko por konvertiĝi, por penti en la biblia kristana senco. Marteno Lutero difinis la penton kiel „plenan ŝanĝon de pensoj kaj de la perceptoj“, kio doniĝas el la orientiĝo al Dio. Kaj en la 3-a el la 95 novaj tezoj tekstas, ke la pento komenciĝas per „nova pripenso kaj malĝojo pri la ĝisnuna falsa konduto“. Por ĉiu unuopa homo validas la alvoko kaj la invito: Konvertiĝu al Jesuo Kristo! Alprenu lin kiel vian savanton kaj Sinjoron!

Due la adresitoj estas la eklezioj kun diversaj denominacioj kaj en diversaj ŝtatoj, ne laste la Evangelia Eklezio en Germanio. Ili estas vokitaj malami la falsajn instruojn kaj vivmanierojn kaj ilin forigi. Ne povas bone funkcii, se tiu aŭ tiu eklezio anoncas la malon de tio, kion la Biblio diras. Ne povas bone funkcii, se ĝi volas beni, kion Dio en la Biblio malakceptas kiel pekon.

Ni alvokas la respondenculojn ene de la evangeliaj eklezioj al la disputacioj. Disponigu vin al interparolo! Ne evitu plu partoprenon! La domo de la eklezio brulas – kaj vi mem submetis fajron. La ŝipo de la eklezio sinkas, ja vi mem ŝarĝis ĝin troe per la rubaĵoj de la tempospirito. Prenu la novajn 95 tezojn kiel la ŝancon, pri via direkto pripensi! Ŝanĝu la direkton!

Trie la adresatoj estas la respondeculoj de la *ŝtato kaj de la socio*. Ili estas alvokitaj serioze alpreni la Dek Ordonojn kiel bonajn vivreglementojn de Dio kaj ilin konsideri ankaŭ en la legislativo. La Dek Ordonoj de Dio nin instruas timi Dion kaj Lin ami, sanktigi la tagon de ripozo, honori gepatrojn, ne murdi, ne malĉasti, ne ŝteladi, ne doni falsan atestaĵon kaj ne avidi tion, kion aliaj posedas. Kiam tiuj ĉi Ordonoj ne estas plu observataj, tiam pli aŭ malpli frue aperas kaoso kaj anarkio.

Multaj ŝtatoj troviĝas proksime al plena fiasko. Post la foresto de la spirita-morala konvertiĝo iom post iom kreskas la ekonomia disfalo. Kie oni ne prenas serioze la Ordonojn de Dio, Lia beno pli aŭ malpli frue retiriĝas. **Vi, respondeculoj en la politiko kaj ekonomio, ni alvokas vin: turnu vin al Dio kaj Liaj bonaj vivreglementoj! Ĉesigu la rapidan moralan disfalon en la ŝtato kaj en la socio kaj la el tio rezultantan amasmortigadon en la patrinaj uteroj! Malpermesu la blasfemadon kaj la eŭtanasion!**

Ĉiu unuopa civitano, ankaŭ ĉiu ekleziano kaj politikisto estas invitata konvertiĝi al Dio, kiu nin kreis, kiu nin amas kaj pro tio sendis sian Filon Jesuon Kriston en tiun ĉi mondon, por nin savi de la peko, morto kaj diablo. La reformacio, por kiu Dio uzis la aŭgustenan monakon kaj teologian profesoron Martenon Luteron ek de la jaro 1517, estis *movado penta*. Kaj ankaŭ por ni nuntempe estas grava la rekono, ke ĉiu unuopulo, la eklezio kaj la socio bezonas pentofaron. **Por ĉiu homo validas la alvoko: Konvertiĝu kaj turnu vin de viaj malbonaj vojoj! Turnu vin al Dio kun instruo kaj vivo!**

La novaj 95 tezoj devas resti senefikaj, se ni ilin rigardas nur kiel paperpecon. Ne, tia la afero ne estu! Estu prefere tiel, ke la pentotezoj kontribuu al la *penta vivo*, vivo kun deturno de la sendiaj vojoj kaj sinturno al Jesuo Kristo, al lia evangelio kaj liaj ordonoj. Jesuo Kristo diras: „Kiu havas miajn ordonojn kaj observas ilin, tiu estas, kiu min amas“ (Johano 14,21.24). **La pentotezoj konduku al nova *movado de pento* - tiam ili atingos sian celon. Kaj tiu movado de pento komenciĝas ĉe vi kaj ĉe mi.** Al tiu pento helpu nin la triunua Dio! Amen.

*Lothar Gassmann*

# Ek de la pentotezoj ĝis la movado de pento

## Kial nova reformacio estas nepra

*Prelego de d-ro teol. Lothar Gassmann*
*okaze de la kongreso „Reformation heute“*




Admona garddeĵoro antaŭ la sinodo de la Evangelia Eklezio en Germanio

**La momenta situacio en la eklezio**

La evangeliaj eklezioj en pluraj landoj malproksimiĝis niatempe tre foren de sia biblia-reformacia bazo (*ecclesia semper reformanda*). En nia tempo la abismo al la biblia-reformacia normo fariĝis tre profunda. Reformacio estas tiel – ene de la protestantismo! – nun pli nepra ol iam ajn. Sekve mi volas surbaze de la dogmaj ĉefpunktoj (*loci*) proponi sisteman superrigardon pri la plej gravaj devojiĝoj.

Laŭ la biblia-reformacia vidpunkto la *eklezio estas kreaĵo de la vorto de Dio* (*creatura verbi Dei*). Marteno Lutero skribas: „Kie la vorto estas, tie la eklezio estas“ (*Ubi est verbum, ibi est ecclesia*; WA 39/2, 176). En la konfesproklamo de Aŭgsburgo la eklezio estas difinita kiel „la kunveno de la kredantoj, en kiu la evangelio pura estas instruata kaj la sakramentoj konforme al la evangelio estas administrataj“ (CA 7). Ankaŭ Johano Kalveno tion esprimas tiel:

„Ĉie, kie ni perceptas, ke la vorto de Dio estas pure predikata kaj aŭdata kaj la sakramentoj estas administrataj laŭ la interveno de Kristo, oni neniel povas dubi, ke ni havas antaŭ ni la eklezion de Dio“ (*Institutio Christianae Religionis* IV,1,9).

Eklezio estas kreaĵo de la vorto de Dio. Kaj tiu vorto estas al ĝi laŭ la unika kaj ne superebla maniero donita en la Biblio. Sed kio okazas, se la vorto estas de la eklezio forrabita kaj se ĝi mem forrabas la vorton de si? Tio neniel estas retorika demando. Ja en la precize tia situacio de la pli kaj pli perdiĝanta vorto de Dio troviĝas nuntempe la evangelia eklezio.

Komencante per la epoko de iluminismo kaj de la aŭtonomion pretendanta raciismo la kritiko de la Biblio provis superregi la vorton de Dio. Ĉar tiu vorto – kontraŭ ĝia propra pretendo (komp. ekz. Joh 17,17; 1 Tim 3,16; 2 Pet 1,20s.) – estis prenita kiel la nur homa vorto, ĝi por multaj perdis sian aŭtoritaton. La eklezio tiamaniere estis senigita de sia bazo kaj de sia imunforto kontraŭ la tempospirito kaj la tiel aperantaj ideologioj. Nikolaus Ludwig Graf von Zinzendorf poeziis: „Se vorto via la validon perdu – sur kio straru nia kredo? Min ne logas mil planedoj, sed plenumi vorton vian“ Tion oni povas diri ankaŭ koncerne la eklezion: Se via vorto ne havu plu validon – sur kio povas stari la *eklezio*?

Multaj ne konscias, ke la kritiko super la Biblio finfine venas el la sinteno skeptikisma (por ne diri: senkreda). La potenco de Dio – sin revelacii per profetaĵoj pri la estonto ekzemple – kaj fari miraklojn, estas klarigita kiel io neebla resp. ne konforma kun la aŭtonoma racio. Tiu sinteno de la skeptikismo tamen troviĝas en kontraŭdiro kun la tuta mempretendo de la Sankta Skribo. „Glorata estu Dio la Eternulo, Dio de Izrael, kiu sola faras miraklojn“ ni ekz. legas en la psalmo 72,18.

La falsa, per skeptikismo trapenetrata hermeneŭtiko, kiel ĝi ekzemple manifestiĝas baze en la historia-kritika metodo, baziĝas sekve sur la falsa bildo pri Dio. Ĝi imagas *Dion* kiel la senpovan principon – iasence „sen brakoj kaj gamboj“, kiu ne povas interveni en la iron de la mondo. La demando pri la Skribo estas tiel baze la demando pri Dio. Nia kompreno, kian ni levas pri Dio, decidas pri nia rilato al la Sankta Skribo.

De la instruo pri Dio dependas la *kristologio* (instruo pri Kristo) senpere. Se en la komenca epoko de la eklezio la arianismo, kondamnita kiel herezo, la eternan diecon de Jesuo Kristo pridubas kaj Kriston tamen rekonas kiel la supernaturan *Logos* (la vorto de Dio), tiel ni nuntempe staras konfronte al la misinstruoj ekster kaj ene de la eklezioj, kaj kompare kun tiuj la arianismo preskaŭ jam povus validi kiel ortodoksa (ĝustakreda) instruo. Senkonsidere la radikalajn kontraŭantojn de Kristo, kiuj la ekziston de Jesuo Kristo negas, multaj aliaj rekonas ĉe li nur plu lian homan ekziston. Tiel Jesuo estus socia revoluciulo, liberiganto, pacpredikanto, esenano, modelhomo kaj simile, sed neniukaze la Filo de Dio resp. Dio en la dua persono de la Trinunuo. Tiaj rigardoj estas en la areo de la evangelia eklezio ne nur tolerataj, sed de la influpotencaj teologoj ankaŭ masive reprezentataj.

En la Sankta Skribo estas tamen klare emfazite: „Se ni akceptas la ateston de homoj, pli granda estas la atesto de Dio: ke Li atestis pri Sia Filo. Kiu kredas al la Filo de Dio, tiu havas en si la ateston; kiu ne kredas al Dio, tiu faris Lin mensoginto, pro tio, ke li ne kredis la ateston, kiun Dio atestis pri Sia Filo. … Kiu havas la Filon, tiu havas la vivon; kiu ne havas la Filon de Dio, tiu la vivon ne havas“ (1 Joh 5,9.12).

Per la malpleniĝo de la instruo pri Dio kaj la kristologio okazas la malpleniĝo de la *hamartiologio* (instruo pri peko) kaj de la *soteriologio* (instruo pri saviĝo). Kie oni la vorton de Dio kritikas, kie oni al Dio kaj Lia Filo Jesuo Kristo neniun supernaturan efikopovon plu atribuas, tie restas la homo ĉe si sola. Al tiu homo restas nur plu fidi je sia supozita „bona kerno“, negi sian pekeman koruptecon kaj perditecon kaj spasme klopodi per sia memsavado.

Tiaj foje apertaj, foje kaŝitaj ideologioj de memsaviĝo nun en forta amaso eniris la ekleziojn. Kiel ekzemploj estu ĉi tie menciataj:

- feminisma „teologio“ pri la sango, kiu esperas sanigon el fortoj de virino kaj de ŝia menstruacia sango anstataŭ de Jesuo Kristo;

- „teologio“ de liberiĝo kaj revolucio, kiu sian esperon adresas al la povo de la sociaj grupoj kaj ilia revolucia potenco;

- „teologio“ de la psiko, kiu la sanon esperas ricevi el la forto de la homa memo kaj de la adekvataj teknikoj, kiuj onidire servas al la memrealiĝo de la homa memo.

Kontraŭ ĉiuj tiaj klopodoj oni devus kontraŭpozicii la vorton de la apostolo Petro, kiu per rigardo al Jesuo kiel la viva Filo de Dio, al la sinedrio en Jerusalemo alvokis: „Kaj en neniu alia estas savo; ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo, donita inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj“ (Ago 4,12)

Kie la kredo en Dion kaj Lia povo perdiĝas, alvenas demonoj tra la malantaŭa pordo. Kaj tiel ankaŭ sur la kampo de la etiko oni povas observi evoluon, kiu kun sia dimensio kaj fortego povas esti prijuĝata nur sub la demona inspiro. La digdetruiĝo de neantaŭsentita grandeco aperas en la lastaj jardekoj en la socio kaj en la eklezio de pluraj landoj. Resume mi nomu nur kelkajn ekzemplojn el ili:

- la konstante malpligrandiĝanta kontraŭstaro al la mortigado de la beboj en la patrinaj uteroj, inkluzive de la kazoj ene de la evangeliaj eklezioj;

- la kreskanta tolerado (kaj parte jam „benado“) de la homseksualaj vivformoj;

- la ofta manko de klaraj ekleziaj pozicioj koncerne la „liberan amon“, la eks-

tergeedzeca kunvivado, pornografio, poligamio, incesto kaj eŭtanazio.

La Sankta Skribo klare avertas antaŭ tiaj devojiĝoj kaj antaŭ iliaj sekvoj:

„Tial Dio fordonis ilin al malhonoraj pasioj; ĉar iliaj virinoj ŝanĝis la naturan uzadon en kntraŭnaturan; kaj tiel same ankaŭ la viroj, forlasante la naturan uzadon de la virino, brulis en sia volupto unu al alia, kaj viroj kun viroj faris hontindaĵojn kaj ricevis en si mem la taŭgan rekompencon de sia malvirto. Kaj ĉar ili malŝatis teni Dion en sia konado, Dio fordonis ilin al malaprobinda menso, por ke ili faru nedecaĵojn; plenigite de ĉia maljusteco, malvirteco, avideco, malboneco; plenaj de envio, mortigo, malpaco, ruzo, malico; flustrantaj kalumnioj, diomalamantaj, insultantaj, arogantaj, fanfaronemaj, elpensantaj malbonaĵojn, malobeemaj al gepatroj, senprudentaj, nefidindaj, neparencamaj, senkompataj; kiuj sciante pri la juĝo de Dio, ke la farantoj de tiaj agoj meritas morton; ne nur mem faras ilin, sed ankaŭ konsentas al la farantoj de ili“ (Rom 1,26-32).

„Aŭ ĉu vi ne scias, ke la maljustuloj ne heredos la regnon de Dio? Ne trompiĝu: nek malĉastuloj, nek idolanoj, nek adoltuloj, nek molmoruloj, nek viruzaĉantoj, nek ŝtelistoj, nek aviduloj, nek drinkuloj, nek insultantoj, nek rabemuloj, heredos la regnon de Dio. Kaj tiaj estis kelkaj el vi; sed vi laviĝis, sed vi sanktiĝis, sed vi justiĝis en la nomo de la Sinjoro Jesuo Kristo kaj en la Spirito de nia Dio“ (1 Kor 6,9-11).

Do, anstatsŭ la – de seksualaj perversaĵoj – trafitajn homojn helpi kaj ilin konduki al la saniga kaj liberiga amo de Dio, la evangeliaj eklezioj troviĝas en kreskanta nombro de la landoj meze de sia misanoncado kaj tiajn perversaĵojn proklamas bonaj kaj lasas tiujn homojn en iliaj pekoj kaj en ilia perditeco. Tia sinteno – tion oni devas klare diri – mem estas „perversa“. Ĝin oni povas kompreni nur kiel signon de la lasttempa blindiĝo kaj en la senco de la satiĝo por esti juĝata. Se oni aldonas ankoraŭ la ĵus ene de la homseksualaj rondoj aperantan epidemion de aidoso, tiam oni nepre estas atentigataj pri la sekva vorto el la Biblio:

„Kaj la ceteraj homoj, kiuj ne estis mortigitaj per tiuj plagoj, ne pentis pri la faroj de siaj manoj, por ne adorkliniĝi al demonoj, kaj al la idoloj oraj kaj arĝntaj kaj kupraj kaj ŝtonaj kaj lignaj, kiuj povas nek vidi, nek aŭdi, nek marŝi; kaj ili ne pentis pri siaj mortigoj, nek pri siaj sorĉoj, nek pri sia malĉasado, nek pri siaj ŝteloj“ (Apo 9,20 s.).

En tiu ĉi citaĵo temas pri la malmoralo kaj ankaŭ pri la „malbonaj spiritaj“, al kiuj la homoj dum la fintempa situacio sin pli kaj pli malfermos. Sed ni observu nun la kampon de *pneŭmatologio* (instruo pri la Sankta Spirito), kaj ni vidos, ke

tiuj malbonaj, demonaj spiritoj ĉiam pli aŭdace enpenetras en la eklezion. Sed la plej danĝera, ĉar la plej tentopova povus esti la aserto, ke la Sankta Spirito agas en ĉiuj religioj. La Sankta Persono, la tria persono de la Triunuo, estas tiel montrata identa kun la spiritoj de hinduismo, ŝintoismo, afrikaj kaj amerikindiĝenaj klanreligioj. Kaj ankaŭ en la religioj de Mahometo, de Budho, Zarathustro kaj de multaj aliaj homoj tiel laŭdire revelacias sin la sama Dia Spirito, kiun oni adoras en la juda kaj kristana kredoj.

Ke tiaj rigardoj metis sian piedon meze de la eklezian spacon, dokumentas multaj komunaj konferencoj kaj „preĝkunvenoj“ kun adeptoj de aliaj religioj. La Sankta Skribo tamen klare avertas antaŭ ĉia formo de religia intermiksado:

„Sed mi diras, ke tion, kion oferas la nacianoj, ili oferas al demonoj, kaj ne al Dio; kaj mi ne volas, ke vi partoprenu kun demonoj“ (1. Kor. 10,20). „Kaj kian akordon havas Kristo kun Belial? aŭ kian kunecon havas kredanto kun nekredanto? Kaj kian konsenton havas templo de Dio kun idoloj? ĉar ni estas templo de Dio vivanta… Eliru el inter ili, kaj estu apartaj!“ (2 Kor. 6,15 ss.).

Post ĉio dirita ne estas mire, ke ankaŭ en la *ekleziologio* (instruo pri eklezio) klaraj bibliaj mezuroj perdiĝis. Tio montriĝas antaŭ ĉio en tio, ke la eklezio en multaj ŝtatoj apenaŭ plu distingiĝas de la „mondo“. Ju pli „tempokonforma“ kaj „mondmalferma“ eklezio volas esti, ju pli ĝi troviĝas en danĝero forgesi sian propran vorton, kian ĝi devus doni al la larĝe ateisma kaj malcertiĝinta loĝantaro. Kiu la tagsloganojn de la politiko maldekstre kaj dekstre faras por sia programo, tiu pli kaj pli perdas scipovon aŭskulti la tute alian vorton de Dio. Ankaŭ la evangelia eklezio mem estas niatage en danĝero pro la mondkonformiĝo, pro sia malkomponiĝo en la „mondon“. Tiel ĝi faras sin mem superflua, kion la alta nombro de eksiĝoj en pluraj eŭropaj ŝtatoj draste dokumentas.

Kio finfine koncernas la eskatologion (instruo pri la lastaj aferoj), la nova alveno de Kristo jam delonge estis fare de la teologo Rudolf Bultmann kaj de liaj multaj disĉiploj de la predikpupitroj kaj de la universitataj katedroj el la kredkonfeso „forstrekita“. Anstataŭ la nova alveno de Kristo kaj la starigo de la mesia pacregno fare de la Sinjoro estis enkondukita por multaj la reveca apero de la per la homaj fortoj aranĝota surtera pacregno (proleptika mesiismo).

Multaj agadoj kaj konferencoj sur la evangelia kampo (ekz. la „koncilia proceso por justeco, paco kaj konservado de la kreitaro“) portas la markon de tiu ĉi pensmaniero. Oni ne rimarkas, ke la pekemaj homoj neniam povas atingi daŭran pacon, eĉ se tiu laŭ la humanisma imago estus tiel bela. Kiel mi aliloke (en miaj libroj  pri la temoj: „Konziliarer Prozess“, „New Age“ kaj „Der Traum von der *Einen* Welt“ tion prezentis, kondukas tiaj utopioj – spite ĉiujn unuarigarde bonajn

celojn – rekte al la ŝajna pacregno de Antikristo.

Jam tiuj ĉi malmultaj ekzemploj montras, ke la eklezio pli kaj pli proksimiĝis al la mondo (komprenata kiel la al Dio malamika „kosmo“) – en diversaj ŝtatoj ĝi proksimiĝis al la mondo eĉ pli ol kelkaj „mondecaj“ politikistoj. Tiel atendas pluraj (konservativaj) politikistoj al helpa vorto de la evangelia eklezio – ekzemple ĉe la demando pri abortado, eŭtanazio kaj homseksualeco – kaj tamen restas de ĝi solaj. Realiĝas la antaŭdiraĵo: „Ĉar jam venis la tempo por la komenco de la juĝo ĉe la domo de Dio“ (1 Pet 4,17). Nova reformacio iĝas nepra.

## Kia povus aspekti la nova reformacio

Kompare kun la situacio en la tempo de la reformacio de Marteno Lutero, Huldreich Zwingli kaj Johano Kalveno troviĝas kelkaj similecoj. Ankaŭ tiam la eklezio estis – nome, la rom-katolika eklezio – mondkonforma. La Biblio estis fare de la papo elĵetita el la konsidero. Krom la klerikuloj verdire neniu havis al ĝi alpaŝeblon. La mondo kun lukso kaj renomo enpenetris la eklezion. La indulgencoj estis la simptomo por la malmultekosta graco kaj monavido. La eklezio kaj la ŝtato estis pli malpli identaj pere de la ekleziaj dukoj kaj la regenteco de la papo. La miljara regno estis en la formo de la katolika eklezio „anticipita“. La misaĵoj estis grandegaj kaj reformacio neevitebla.

En nia tempo – nun en la evangelia eklezio, sed ankaŭ en la katolika – ĉio fariĝis ankoraŭ pli malbona. La fundamentoj de la fido estas komplete malplenigitaj, kiel montras la supre menciitaj ekzemploj. Certe troviĝas kelkloke ankoraŭ nedifektitaj komunumoj. Sed la nova situacio, kiu aperis, ŝajnas tiel, ke antaŭ ĉio ek de la 90-aj jaroj (temas pri la XX-a jarcento) de la ekleziaj estraroj kaj sinodoj en pluraj ŝtatoj estis akceptitaj tiaj decidoj, kiuj troviĝas en klara kontraŭdiro al la ordonoj de Dio, tiel ekzemple la toleremo por la murdado de la beboj en la patrinaj uteroj kaj por la subteno de homseksualaj kaj radikale feminismaj movadoj.

Kia do povus aspekti la nova reformacio? Ĝi devus unuarange alvoki al la pentado kaj la konvertiĝo al la Sinjoro Jesuo Kristo kaj liaj ordonoj. Ni rememoras, kiel tekstis la unua de la 95 tezoj de Marteno Lutero: „Ĉar nia Sinjoro kaj majstro Jesuo Kristo diras: *Faru penton, ĉar la ĉiela regno alproksimiĝis* (Mat 4,17), li volis, ke la tuta vivo de la kredantoj estu pento.“ La reformacio de Marteno Lutero estis penta movado. Ĝi komenciĝis per reveno al la vorto de Dio kaj al la centra mesaĝo, en ĝi trovata, pri la justigo de la pekanto sole el la graco.

Ankaŭ niatempe reformacio devus komenciĝi per la pentado, per lapripenso pri la ĝisnuna vojo kaj pri la radikala konvertiĝo. Nur tiel la eklezio denove povus

esti *„creatura verbi“*, la kreaĵo de la vorto de Dio en la origina senco.

Marteno Lutero difinas la „penton“ tiel:

„Tiel signifas la pento aŭ *metanoia* rebonigon kaj envidon en propran malperfektecon, post kiam oni suferas la punon kaj envidas la eraron. Sed tio ne povas okazi sen ŝanĝo de sia pensmaniero kaj de la amo (al si mem)“ (Letero al Staupitz 30-n de Majo 1518; citite laŭ Luther Deutsch, eld. de K. Aland, kaj. 2: Der Reformator, Göttingen 1991, p. 29).

Simile skribas Johano Kalveno (Calvin):

„La vorto \`pento\` venas ĉe la hebreoj de \`returno\` aŭ \`reiro\`, ĉe la grekoj de ŝanĝo de \`pensado\` aŭ \`ŝanĝo de konkludo\`; ambaŭ lingvaj eltiraĵoj plene korespondas kun la afero: la pento temen esence estas farita per tio, ke oni el si mem eliras kaj sin turnas al Dio, ke oni demetas la antaŭan pensmanieron kaj alprenas la novan … La pento estas la vera orientiĝo de la onia vivo al Dio, kiel tio estiĝas el la sincera kaj serioza diotimo; ĝi ampleksas unuflanke la klopodon de la onia karno kaj de la malnova homo, aliflanke de la viviĝo en la spirito“ (*Institutio Christianae Religionis* III,3,5).

Ankaŭ la estro de la anabaptistoj el la reformacia tempo, Menno Simons, nepre indikas al la bezono penti:

„Ho, karaj sinjoroj, nek unu harvilon ni profitos, se ni estos nomataj kristanoj kaj se ni fanfaronos per la sango, morto, merito, graco kaj vorto de la Sinjoro, ĝis ni nin ne deturnos de tiu sendia, senmorala kaj malutila vivo; ĉio estas vanta, ke ni nomiĝas kristanoj; ke Kristo mortis; ke ni naskiĝis en la tempo de la graco kaj ke ni estas baptitaj per akvo, ĝis ni ne obeos lian vorton, konsilon, averton, volon kaj ordonon … kia helpo, se ni multon parolas pri Kristo kaj lia vorto, se ni en Kriston ne fidas kaj ne volas laŭ lia vorto vivi! Mi ankoraŭfoje diras, vekiĝu kaj elsarku la malbenitan malfidon kun ĝia maljusteco el viaj koroj kaj komencu pian kaj pentofaran vivon, kiel la Skribo instruas; ja Kristo diras: ‚Se vi ne pliboniĝos, vi ĉiuj tiel ankaŭ pereos’, Luk 13,5“ (*Fundament des Glaubens*, Bielfeld 1996, p. 20 ss.).

En la 20-a jarcento Georg Steinberger skribas en sia traktaĵo „Buße - ein himmlisches Geschenk“ (Grosshöchstetten, 11. eld. 1987, p. 7 s. k. 18):

„*... konfesi kaj lasi* estas la biblia vojo … *La peko, kiun oni faras, iras kiel inklino el onia koro, kaj se oni ĝin faras, ĝi reiras en la konsciencon*. Kaj se ĝi post tio estas kovrita per intenco, ĝi tiel fariĝas malhela punkto, en kiu la malamiko dum malfacilaj horoj plantas sian duban levstangon kaj ĉion igas malsolida kaj el tiu ĉi

punkto starigas onian tutan savsperton sub demandosignon … Fari penton signifas nun: super si mem rompi la mezurbastonon, lasi sin forigi flanken kiel malbenitan kaj disponigi la spacon, kiun ĝis nun okupis la onia memo, al la Krucumito, al li doni la plej altan lokon en onia vivo, kiel Dio al li donis la plej altan lokon ĉe Sia dekstro. Nia memo povas esti flankenpuŝita nur per la memo de la Krucumito. Nur, se Kristo alprenas la pozicion de la onia memo, oni estas liberigita de la propra memo.“

Reformacio do devus esti movado. Kaj ĝi devas niatage same kiel tiam koncentri sin al la „kvarfoje sola“: *solus Christus, sola scriptura, sola gratia, sola fide* (sole Kristo, sole la Sankta Skribo, sole el graco, sole el fido).



*„Nur la Sankta Skribo“* – nome, sen ellasaĵoj aŭ aldonaĵoj, sen iu aldona, paralela aŭ eĉ supermetita instrua tradicio, sen konformiĝo al la tempospirito, sen la nuatempe reganta historia-kritika biblia eksegezo, kiu sian originon havas en la iluminismo. Lutero diris:

„La vorto de Dio devus konsistigi la artikolojn de la kredo kaj cetere neniu, ankaŭ neniu anĝelo.“ „Ni devas la profetojn kaj la apostolojn lasi sidi ĉe la pupitro kaj aŭskulti ĉe iliaj piedoj, kion ili diras, kaj ne diri, kion ili aŭdi devus.“ „La Skribaĵoj (la Biblio) estas la altaroj de Kristo, sur kiuj ni devas oferi nian obeemon.“ „Mi havas nenion krom tiun ĉi libron. Per ĝi mi devas min defendi kaj mi havas neniun konsolon krom tiun ĉi konvulton de papero.“

*„Nur Jesuo Kristo“* – kaj cetere Jesuo, kiel la Biblio lin atestas, Jesuo kiel la eterna, homo iĝinta Filo de Dio, Jesuo sen iu ajn apud si, sen la sanktuloj, sen la „Dipatrino“ kaj la „Reĝino de la ĉielo“, Jesuo sen iu ajn aldonaĵo kiel „Jesuo kaj …“ aŭ „Jesuo jes, sed ankaŭ …“ Lutero diris:

„Mi konas nenion kaj mi volas koni nenion en diecaj aferoj krom sole mian Sinjoron Kriston, li devas esti sola ĉio, kio mian animon koncernas kaj inter Dio kaj mi estas aranĝenda.“ „Li estas ĉio, la unua, la meza kaj la lasta ŝtupo sur la ŝtuparo en la ĉielon. Ja per li ni devas komenci, daŭrigi kaj tra li veni en la vivon.“ „Kiu min, la perditan kaj malbenitan homon savis, alprenis, akiris el ĉiuj pekoj, el la morto kaj el la povo de la diablo, ne per oro kaj arĝento, sed per sia sankta, altvalora sango kaj per sia senkulpa sufero kaj morto.“

*„Nur el graco“* – kaj cetere sen iomete da „kunhelpo“ niaflanke, sen meritaj bonaj faroj, sen la memsaviĝaj klopodoj de iu ajn speco. Lutero diris:

„Kun granda fervoro mi klopodis per propraj faroj esti justigita … Mi ne povis vidi Kriston, ĉar oni min instruis, esperi la pardonon de pekoj kaj la savon tra niaj faroj.“ „Staupitz (la animprizorganto dum la junaĝo de Lutero dum lia interna batalo) min konsolis per tiuj ĉi vortoj: Alrigardu la vundojn kaj la sangon de Kristo, verŝita por vi.“

*„Nur per la fido“* – nome, kun la konfida kapto de tio, kion Jesuo sur la kruco por ni faris, ni ricevas, sen meritoj, sen rekompenco, la gracon de la pekopardono, kiu nin kapabligas por nova vivo en la postsekvo de Kristo (kun la el tio *sekvataj* bonaj faroj!). Lutero diris:

„La fido estas arto, laŭ kiu oni ne perceptas, sed lasas la racion fali, la okulojn fermas kaj sin simple disponigas al la vorto kaj ĝin postsekvas per sia vivo kaj mortado“ (Citaĵoj de Lutero el: G. Buchwald, D. Martin Luthers Leben und Lehre in Worten aus seinen Werken und Briefen, Gütersloh 1947).

Tiuj ĉi bazaj konoj pri la reformacio estas neeviteble aktualaj. Tiel, reference al la novaj 95 tezoj el la jaro 1996 oni povas konstati:

„Sole Jesuo estu la Sinjoro, ne aliaj sinjoroj, ne la fondintoj de religioj aŭ ideologoj. Sole la vorto de Dio, skribita en la Biblio, havu validon, ne aliaj vortoj, revelaciaj fontoj kaj ideologioj. Sole el la graco kaj per la fido ni estas savitaj, ne per la memsaviĝaj teknikoj, imagoj pri reenkarniĝo kaj aŭdacaj provoj preterkure atingi la kompletan savstaton (ŝalom) de la regno de Dio per revanta atendado je el propraj homaj fortoj aranĝota pacregno“ (Reformacio nuntempe, tezoj 52-54).

La esenca reformacia afero estis tuŝita en la 20-a jarcento en la teologia klarigo de Barm. La unua artikolo tekstas:

„Jesuo Kristo, kiel li estas por ni atestita en la Sankta Skribo, estas tiu unu vorto de Dio, kiun ni alaŭskultas, al kiu ni klopodas en nia vivo fidi kaj obei. Ni forĵetas la falsan instruon, ke la eklezio povus kaj devus kiel la fonton de sia anoncado apud tiu ĉi unu vorto de Dio agnoski ankaŭ aliajn fenomenojn kaj potencojn, estaĵojn kaj verojn krom la revelacio de Dio.“

La reformacio signifas: reiri al la biliaj reformaciaj fundamentoj. Kiamaniere oni tion povas praktike aranĝi, mi volas skize prezenti per kelkaj ekzemploj.

Sur la unua loko devus stari la *pentofaro* kaj la *unueco de la kredantoj*. Kie do okazu reformacio, se ne ĉe ni mem, en niaj propraj koroj? Ni bezonas *„reformacion de la koroj“*. Tial lasu ni nin purigi per la sango de Jesuo Kristo! Alaŭskultu ni lian vorton! Ekserĉu ni lin per preĝo! Ekserĉu ni la gefratojn en kredo kaj la komunumon! Ekobeu ni liajn ordonojn!

Bedaŭrinde la korpo de Kristo estas tre disigita. Nepra estas tamen lojaleco de la kredantoj en la esencaj punktoj, nome en konfeso, ke Jesuo Kristo estas la vivanta Sinjoro kaj savanto. Post tio ni povas esti atestantoj por la nekredantoj ekster kaj interne de la eklezio.

Tiel ni ne volas disputi pri flankaj demandoj, sed esti en la esencaj punktoj unu – kompreneble ne je ĉiu prezo, sed en la vero de Kristo. Kaj la mezurbastono por tio, la komuna bazo, estas la Sankta Skribo.

Ĝuste ĉar la Sankta Skribo estas la mezuro, la pribiblia kritiko kun el ĝi rezultantaj konsekvencoj devas esti forte priserĉata. *Biblifidela edukado* estas nepra.

*Biblifidelaj lernejoj* kaj altlernejoj devus esti oficiale agnoskataj kaj subtenataj.

Tie, kie la vorto de Dio denove estas prenata serioze, povas enveni *renovigo* de la teologio, eklezio kaj finfine ankaŭ de la socio. Jen sekvas la fido en Jesuon Kriston kiel la veran Dion kaj veran homon. Jen sekvas la kredo en la povon de Dio: ke Li povas kaŭzi miraklojn kaj revelaciojn, pri kiuj la Biblio raportas. Jen sekvas la fido en la savon, kiu nur el la anstataŭanta ofero de Kristo, el lia krucumo kaj releviĝo kreskas. Sole Jesuo Kristo estas „la vojo, la vero kaj la vivo“ (Joh 14,6). Kaj el tio sekvas la atendado de lia denova alveno kun potenco kaj en gloro.

La renovigo de la eklezio povas okazi nur fare de Dio, per la efikado de Lia Spirito, sed ĝi devas esti perita de la katedroj kaj predikpupitroj – kaj ankaŭ desube, de ĉiu unuopa kredanto, kiu estas la atestanto de Kristo en tiu ĉi mondo. Ĉiu estas vokita ĉi tie kunagi kaj enpreni la ŝanĝigan potencon de la evangelio en la de Dio malproksiman mondon kaj eklezion. Renovigo de la teologio, eklezio kaj socio povas daŭri unu aŭ du generaciojn, kondiĉe, ke Dio ankoraŭ donacos tempon de graco, tamen la provo devas esti kuraĝe farota.

Plie oni nepre devus denove enkonduki la *edukpunadon en la komunumo*. Ĝi estas nuntempe plene abolita. La herezaj instruantoj kaj publike senmorale vivantaj personoj devas esti el la komunumoj eksigataj, ĉar „malmulto da fermentaĵo trafermentigas la tutan mason“ (1 Kor 5,6). Tio okazas eĉ tiam, se temas pri la eklezia estroj aŭ episkopoj. Kompreneble: Kiu havas en tia kazo la aŭtoritaton kaj povon, tion plenumi? Ĉu ne estas jam tro malfrue? Tio jen estas la seriozaj demandoj en la serioza situacio.

Kaj finfine validas, kontraŭ la tempospirito kontraŭstari, tiel ekzemple kontraŭ la „benado“ de la homseksualaj paroj. Ni devus esti en la mondo „salo kaj lumo“ (Mat 5,13) – kaj ne la oleo en la dentoradoj, kiuj cedas al ĉia tendenco.

Kial en niaj tagoj reformacio estas malfacila?

Ni devas starigi al ni demandon, ĉu reformacio niatage ne estas pli malfacila ol en la tempo de Lutero, ĉu ĝi eĉ ne fariĝis tute neebla. Tri kialoj faras tian konkludon plaŭsibla:

Unue la ekleziaj estraroj kaj la ekleziaj kaj ŝtataj edukinstitutoj daŭre estas okupataj de la iluminismaj fortoj kaj de ili kontaminitaj. Vera *povokartelo* estis konstruita, la alimaniere pensantaj estas iom post iom ekskluzivitaj. La el la novmarksisme formita studenta revoluciumado el la sesdekaj jaroj venintaj lobioj de feminismo kaj homseksualismo akiris aliron al la decidmekanismoj. Kiel en la movo de tenilo estas la kredantoj de supre (de la eklezia presbiteraro) kaj de malsupre (maldekstrecaj kaj ŝajnliberalaj baziniciatoj) premitaj. Momente troviĝas nenia ŝanĝo de tiuj ĉi cirkonstancoj.




Al tio aldoniĝas due, ke la *tempospirito* ĉiam pli malvarme kontraŭagas la kredfidelajn kristanojn. La tendenco en nia socio estas malamikeco kontraŭ Kristo kaj kontraŭ la kristanoj. Tio ne ĵetu nin en miron, ja ni laŭ la eldiroj de la Biblio troviĝas pli kaj pli en la fintempa situacio de la defalo de la kredo kaj de la senleĝeco (*anomia*; Mat 24,12; 2 Tes 2,10). La ordonoj de Dio, Lia volo kaj Lia amo estas surpaŝataj per piedoj. Konfronte al tiu ĉi situacio ni volas kun Reinhold Schneider elvoki: „Nur la preĝantoj ankoraŭ povas sukcesi bloki la glavon super niaj kapoj kaj tiun ĉi mondon protekti antaŭ la juĝantaj fortoj per sanktigata vivo."

Se ni enpaŝis la lastan tempon, tiam stariĝas la demando, ĉu ni kiel la komunumo de Jesuo ankoraŭ havas promesojn pri grandaj nombroj. Aŭ ni troviĝas kiel la fide kaj biblie fidelaj kristanoj en la situacio de *malgranda grego,* al kiu Jesuo diris: „Ne timu, malgranda grego; ĉar bone plaĉis al la Patro doni al vi la regnon" (Luk 12,32)?

Ĉu do reformacio en granda kadro niatempe estas ankoraŭ ebla – aŭ ĉu ĝi povus okazi en malgranda kadro: en niaj koroj, en unuopaj grupoj kaj rondoj, en unuopaj komunumoj, probable eĉ ankoraŭ en unuopaj eklezioj? Ni rajtas la Sinjoron peti, ke li donacu al ni gracon, sed ni ankaŭ ne havas rajton esti disravitaj, se grandaj vekiĝoj ne okazos.

Ni vivas en la *lasta tempo*. La defalo de la kredo ĉe multaj unuopuloj sumiĝas al la granda defalo de la eklezioj. „La malĉastulino de Babilono estas la mondiĝinta eklezio", skribis en la 19-a jarcento la teologia profesoro Carl August Auberlen rigardante al la Apokalipso 17 (*Der Prophet Daniel und die Offenbarung Johan-*

*nes,* Basel 1857, S. 314). Kaj Friedrich Mayer rimarkigas pri tiu ĉi citaĵo: „Ĉi tie ni ne rajtas pensi nur pri ‚Romo', sed sendube pri ĉiuj falsaj ekleziaj fenomenoj sur la tero kaj pri ĉio malaŭtenta, do pri la tuta mondiĝinta ‚kristaneco', kia ankaŭ en la plej malgranda komunumo iom post iom troviĝas. Ili ĉiuj, tiuj eklezioj, konfesgrupoj, sektoj, liberaj eklezioj, komunumoj, neniu unuopa estu ekskluzivita, fariĝis la eta ‚Babelo', plena de konfuzo, kaj ili defalis de ilia komenca spirito" (*Der Tag des Herrn,* Stuttgart 1957, p. 419).

Kvankam mi ne povas konsenti ankaŭ kun la lasta frazo (laŭ mia prijuĝo la situacio ne estas jam en ĉiuj komunumoj tiel malbona), tio ĉi tamen enhavas veran kernon: nome, ke neniu kristana grupo estos netuŝita de la „babela spirito". Neniu komunumo povos diri: „Vi estas la Babelo – kaj ni ne!" Ne, „Babelo" iras tra la komunumojn, jes foje eĉ meze tra la korojn!

Ĉar – tiel difinas la franca biblia instruisto René Pache trafe – la malĉastulino Babilono „ne reprezentas vere certan grupon de la defalo, sed ĉiujn falsajn religiojn sur la tero. Ĉe la katolikoj troviĝis multaj falsaj kristanoj, sed samtiel ĉe la protestantoj, ĉe la ortodoksanoj kaj alie. La spiritan malfidelon praktikas ĉiuj, kiuj sian koron dividas inter Dio kaj la mondo (Jak 4,4); kiuj paralele al severa dogmo tamen malakceptas la konvertiĝon; kiuj devojiĝas de la kredo en la Biblion, negante la diecon de Jesuo Kristo kaj la repaciĝan potencon de lia sango; ĉiuj, kiuj persekutas tiujn, kiuj kredas alimaniere … La ‚granda malĉastulino' estas la defalanta eklezio, kiu ĵuris esti la posedo de Jesuo Kristo kaj nun malĉastas kun la mondo." Ĝi estas „la vivanta bildo de la mondiĝinta religio … la monda sistemo de la spirita konfuziĝo, de la hipokrita diboĉo kaj de la eklezia korupteco en sia tuta abomeneco" (*Die Wiederkunft Jesu Christi,* Wuppertal, 11-a eld. 1987, p. 168. 176s.).

Tiu fintempa eklezio estos revelaciita kun sia tuta korupteco nur dum la kontraŭkristana plagtempo. Kaj tamen ĝi ĵetas sian ombron jam delonge malantaŭ si. Inter kaj apud la jam nomitaj markoj ŝajnas al mi la sekvantaj aparte gravaj:

La babiloneska eklezio de la fina tempo:

- identiĝas kun la mondo kaj konfuzas la Spiriton de Dio kun la spirito de la tempo (Apo 17,2; 18,3);

- praktikas »malĉastecon«, tio signifas: ĝi egaligas la idolojn de paganoj al Dio de la Biblio kaj faras konfuzon inter la religioj kaj ideologioj (Apo 17,2.5.15; komp. Hoŝ 1,2; 3,1);

- havas intereson por mono kaj povo (Apo 17,4.18; 18,7.9-19);

- estas deekstere brila, tamen interne morta (komp. Apo 3,1);

- kaŭzas al la vere kredantaj pli kaj pli da aflikto (Apo 17,6);

- misstiras per falsaj signoj kaj mirakloj for de la savantaj vundoj de Jesuo (komp. Mat 24,24; 2Tes 2,9; Apo 13,13);

- preparas la vojon por Antikristo, kiu ĝin unue utiligas por sia trompado kaj ĝin fine faligas (Apo 17,3.16).

Sed kontraŭe la fianĉineca komunumo de la savitoj:

- konsistas el kredantoj el ĉiuj denominacioj, kiujn bone konas nur Dio (1 Sam 16,7; Joh 17,20-26);

- atendas la novalvenon de Jesuo (Mat 24 f.; 2 Pet 3,11 ss.);

- ne konformiĝas al la tempospirito, sed estas la salo kaj la lumo de la mondo (Mat 5,13 ss.; Rom 12,1; 1 Joh 2,15-17);

- iras tra la monda humiliteco, malestimo kaj persekutado ĝis la ĉiela gloro (Mat 10,9 f.; 24,9-13; 2 Tim 3,12);

- prenas Jesuon por la sola Sinjoro kaj savanto en fidelo kaj malakceptas ĉian religian konfuzon (Joh 14,6; Ago 4,12);

- ne konsideras naive falsajn signojn kaj miraklojn, sed orientiĝas sole al la vorto de la Sankta Skribo (Jer 23,28; 2 Tim 3,14-17);

- preparas la vojon por Kristo, vokante multajn sur lian postsekvon (Mat 24,14).

Ni devas ĉe tio konscii, ke la enŝteliĝo pli kaj pli okazas ankaŭ ĉe la liberaj eklezioj. La „babilono“ iras – kiel jam indikite – meze de la konfesiejoj, eklezioj, komunumoj, grupoj kaj eĉ de la propra koro. Ni devus nin en niaj komunumoj

enketi kaj la fermentaĵon de la babiloneska devojigo eligi, ĝis tio ankoraŭ estas ebla.

Sed konsolas nin la promeso, kiun nia Sinjoro donis al la apostolo Petro, kiu atestis lian Dio-filecon: „Kaj mi diras al vi, ke vi estas Petro, kaj sur ĉi tiu roko mi konstruos mian eklezion; kaj pordegoj de Hades ne superfortos ĝin“ (Mat 16,18). Eĉ se la eklezio kiel institucio ĉiam pli mondakordiĝas kaj iĝas kontraŭeklezio, tamen restas la komunumo de Jesuo kiel la komunumo de la kredantoj viva – ĝis la Sinjoro denove venos en gloro kaj ilin alprenas. Kaj por tio ni rajtas ĉiutage preĝi: Venu baldaŭ, Sinjoro Jesuo!

En tiu ĉi loko oni bedaŭrinde devas atentigi, ke la tempospirito ankaŭ antaŭ la *evangeliaj* (konservativaj) kristanoj ne haltas. En sia malkomforta libro „Wenn Salz kraftlos wird. Die Evangelikalen im Zeitalter juckender Ohren“ (Bielefeld 1996) atentigas la usona aŭtoro John Mac Arthur pri tio, ke ankaŭ en multaj evangeliaj rondoj la *mondkonformiĝo* jam aperis. Mac Arthur avertas antaŭ „pragmatismo“, kiu demandas, kio ĉe la aŭskultantoj „havas sukceson“, pri kio iliaj „oreloj tikliĝas“, kaj tiel la vorto de Dio kaj Lia volo estas puŝata malantaŭen aŭ preteraŭdata.

Jam antaŭ proksimume 200 jaroj la konata dana filozofo Søren Kierkegaard akuzis: „Ho, Lutero, vi havis 95 tezojn: terure! Kaj tamen en pli profunda racio: Ju pli da tezoj, despli malmulte terure. Sed la afero estas multe pli terura: Troviĝas nur unu tezo – la kristaneco de la Nova Testamento tute ne ĉeestas“ (*Christenspiegel*, eldonita en Wuppertal 1979, p. 68). Tiam troviĝis la mondiĝo de la eklezio antaŭ ĉio en tio, ke oni kontentiĝis per la regula dimanĉpieco, kiu nenian efikon sur la ĉiutagan vivon de tiuj kristanoj havis. Kierkegaard nomis tiun „dekadenton de la protestantismo“: „la senspirita mondiĝo“.

En nia tempo oni pri la bazaj bibliaj veroj, kiel „peko“, „pentofaro“, „kruco“ kaj „poreterna perditeco“ – ankaŭ en diversaj evangeliaj eklezioj – ĉiam malpli ofte predikas kaj scias fari larĝan ĉirkaŭvojon preter tio. Anstataŭ tio oni enprenas „amuzevangelion kaj bonfartevangelion“, kiu neniun suferigas, sed ankaŭ neniun povas veki konfronte de la apokalipsaj minacoj. Kontraste al tio Jesuo nin vokas: „Tial viglu; ĉar vi ne scias, en kiu tago via Sinjoro venos“ (Mat 24,42). Ĉiu kristano devus atenti ne esti konsumita de la unueca tendenco de la tempospirito kaj de la kredforfalo. La diablo volas nin formi laŭ si, sed kun la helpo de Dio ni povas al li kontraŭstari (1 Pet 5,8s; Efe 6,10 ss.).

Estas la fina tempo. Tamen ni estas – libere dirite laŭ Lutero – alvokitaj planti pomujon, eĉ se morgaŭ la mondo devus perei – kaj tio signifas: *agi, ĝis la tago estas*. La Sankta Skribo montras al ni, ke eĉ en la lasta horo – meze de la fintempa

juĝokazado kaj leviĝo de la kontraŭkristanaj potencoj – eksonos invito por konvertiĝo – kiom pli laŭte do tiu ĉi invito devus soni en nia tempo nun:

„Kaj mi vidis alian anĝelon, flugantan en meza ĉielo, havantan eternan evangelion, por evangelii la loĝantojn de la tero kaj ĉiun nacion kaj tribon kaj lingvon kaj popolon kaj dirantan per granda voĉo: Timu Dion kaj donu al Li gloron, ĉar venis la horo de Lia juĝo; kaj adorkliniĝu al la Kreinto de la ĉielo kaj la tero kaj la maro kaj la fontoj akvaj“ (Apo 14,6 s.)

## Kiamaniere la kredantoj en tiu situacio povas konduti

Daŭre validas kredi, ami kaj esperi. Kaj validas daŭre preĝi; por konvertiĝo en la eklezio kaj socio, por tiuj, kiuj portas publikan responson, por la tentataj komunumoj kaj personoj. Ne estas vere, ke ĉe Dio neniam troviĝas „tro malfrue“. Sed ni kiel homoj ne povas scii, kiam tiu „tro malfrue“ estas jam atingita.

*Antaŭpaŝi aŭ elpaŝi?* – Tiu ĉi demando stariĝas por multaj kristanoj. La respondo ne povas esti paŭŝala. Ĝi dependas de la persona gviditeco de la unuopa persono per la Sinjoro kaj ankaŭ laŭ la situacio loke. Ĉiukaze ĉiu, kiu antaŭ tia demando staras, ne pretervidu la tuteklezian situacion – eĉ se en certa loko bona, profundkredanta paroĥestro sian taskon plenumas. Certe ni ĉiuj volas tian paroĥestron ne lasi sola. Sed aliflanke povus esti atingita limo, kiam la tuta komunumo decidas kaj devligas per aferoj, klare kontraŭaj al la vorto de Dio. Tiel ekzemple ĉe la punkto „homseksualeco“ kaj „fundamentalismo“ tio povus okazi (kaj intertempe jam okazis). Altrudiĝas la demando: Ek de kiu punkto mi partoprenas en la fremda pekado?

Mi atentigas je 2 Kor 6,14-18, kie tekstas:

„Ne estiĝu kunjunguloj maltaŭge kun nekredantoj; ĉar kian partoprenon havas justeco kun maljusteco? aŭ kian komunaĵon havas lumo kun mallumo? Kaj kian akordon havas Kristo kun Belial? aŭ kian kunecon havas kredanto kun nekredanto? Kaj kian konsenton havas templo de Dio kun idoloj? ĉar ni estas templo de Dio vivanta; kiel diris Dio: Mi loĝos inter ili, kaj Mi iros inter ili; kaj mi estos ilia Dio, kaj ili estos Mia popolo. Tial: Eliru el inter ili, kaj estu apartaj, diras la Eternulo, kaj ne tuŝu malpuraĵon; kaj Mi vin akceptos, kaj mi estos por vi Patro, kaj vi estos Miaj filoj kaj filinoj, diras la Eternulo, Plejpotenca.“

Kaj Apo 18,4 s., la citaĵo, rilatanta al la fintempa „malĉastulino“, la „granda Babilono“, tekstas:

„Kaj mi aŭdis alian voĉon el la ĉielo, dirantan: Elvenu el ŝi, ho Mia popolo, por

ke vi ne partoprenu en ŝiaj pekoj, por ke vi ne ricevu el ŝiaj plagoj."

Kiel dirite, stariĝas la demando: Ek de kiu punkto mi komencas partopreni en la fremdaj pekoj, se tiuj nun estas prezentataj io bona? Mi volas klare diri: Ĉiu homo estas laŭ sia naturo pekulo. Ni ne rajtas diri, tiu aŭ tiu peko estus pli peza. Tamen estas io nova, nova afero, se en la ŝtato kaj en la eklezio de nuna tempo certa peko, ĉiam denove en la Sankta Skribo estas nomata la abomena peko, nome la praktikata homseksualeco, estas prezentata kiel la egalrajta, jes eĉ „laŭ la volo de Dio" donita formo de la seksualeco. Mi volas diri ankoraŭfoje: Ni volas la trafitajn homojn animprizorge helpi. Ni volas al ili proponi nian plenan amon kiel la komunumo, la amon de Kristo. Sed ni ne povas diri ion, kion Dio abomenas – kaj ni ne povas al tia „beno" diri nian aprobon.

En la Sankta Skribo ni trovas multajn ekzemplojn por la *pentofaro*, por radikala konvertiĝo de la homoj al Dio. Du ekzemplojn mi volas prezenti fine de miaj pensoiroj. La *reĝo David* faris individuan penton pro sia propra krimago. Li malĉastis kun Bat-Ŝeba, edzino de la Ĥetido Uria kaj poste lin disponigis al morto. Dio sendis la profeton Natanon al David, por veki ties konsciencon kaj voki Davidon al pentofaro. Kaj David subiĝis antaŭ Dio. En 2 Sam 12 oni povas pri tio legi:

„Kaj Natan parolis al David: … Kial do vi malŝatis la vorton de la Eternulo, farante malbonon antaŭ Liaj okuloj? Urijan, la Ĥetidon, vi mortigis per glavo, kaj lian edzinon vi prenis al vi kiel edzinon, post kiam vi lin mortigis per glavo de la Amonidoj. Nun ne malaperos el via domo la glavo eterne, pro tio, ke vi malŝatis Min, kaj prenis la edzinon de Urija, la Ĥetido, ke ŝi estu via edzino. Tiele diris la Eternulo: Jen mi venigos sur vin malbonon el via domo; kaj mi prenos viajn edzinojn antaŭ viaj okuloj, kaj fordonos al via konkuranto, kaj li kuŝos kun viaj edzinoj antaŭ ĉi tiu suno. Ĉar vi agis sekrete; sed Mi faros tiun aferon antaŭ la tuta Izrael kaj antaŭ la suno. Tiam David diris al Natan: Mi pekis antaŭ la Eternulo. Kaj Natan diris al David: La Eternulo forigis vian pekon, vi ne mortos; sed ĉar vi per tiu faro incitis la malamikojn de la Eternulo, tial la filo, kiu naskiĝis al vi, mortos" (2 Sam 12,9-15).

La penta preĝo en tiu ĉi situacio trovas sian pinton en la krio: „Dio, kompatu min, la pekulon!" Tio estas la modelo por ĉiuj generacioj. Lutero markis la psalmon 51, en kiu tiu modelo estas donita, kiel la „kvaran pentan psalmon":

„Korfavoru min, ho Dio, laŭ Via boneco; laŭ Via granda kompatemeco elstreku miajn pekojn. Lavu min tute pure de mia krimo, kaj purigu min de mia peko. Ĉar miajn kulpojn mi konsciadas; kaj mia peko estas ĉiam antaŭ mi" (Psa 51,1-3).

La reĝo *Joŝija* ordonis la kolektivan pentofaron por la tuta popolo. Lia patro estis la sendia reĝo Amon, lia patrino estis Jedida („Amata“), kiu edukis Joŝian por timi Dion. La avo de Joŝia estis Manasse, kiu simile kiel Aĥab denove enkondukis la paganismon en la regnon de Juda (2 Reĝ 21,2-9). En la oka jaro de sia regado (estinte 16 jarojn aĝa) Joŝija komencis serĉi Dion de sia antaŭulo David. En la dekdua jaro de sia regado (estinte 20 jarojn aĝa) li komencis purigi la regnon Juda, Jerusalemon kaj la provincojn de la iama norda regno de la idolana servado. En la dekoka jaro de sia regado (estinte 26 jarojn aĝa) li taskigis Ŝafanon kaj aliajn renovigi la templon. Okaze de tio la ĉefpastro Hilkia transdonis la libron de la Leĝo de la Eternulo (probable la 5-an libron de Moseo), kiu longtempe estis kaŝita kaj retrovita dum la renovigado de la templo, al Ŝafan. Ŝafan studis la libron, informis la reĝon kaj legis al li. Joŝia reagis al la enhavo de la libro kun disŝirado de siaj vestoj kio estis la signo de lia malĝojo kaj konsterniĝo super la situacio en la lando.

Kaj la aŭguristojn kaj la sorĉistojn kaj la domajn diojn kaj la idolojn kaj ĉiujn abomenindaĵojn, kiuj montriĝis en la Juda lando kaj en Jerusalem, Joŝija ekstermis, por plenumi la vortojn de la instruo, skribitajn en la libro, kiun la pastro Ĥilkija trovis en la domo de la Eternulo. Ne estis antaŭ li reĝo simila al li, kiu turnis sin al la Eternulo per sia tuta koro kaj per sia tuta animo kaj per sia tuta forto, konforme al la tuta instruo de Moseo; kaj post li ne aperis simila al li.“

(El 2 Reĝ 23,4-7.24-25).

Joŝija serĉis Dion. Li trovis la Biblion en la formo de la Mosea leĝlibro (Thora). Li konsterniĝis antaŭ la kolero de la sankta Dio. Li devigis la popolon al obeo al la malnova Ligo. Li purigis la templon, la urbon kaj la landon de Dio de la idolanaĵoj. Kun sia tuta koro li konvertiĝis kaj pentofaris. Kaj kion ni faras? Certe ni aspiras neniun teokration (politikan regadon fare de Dio). Ni ne estas la popolo de Dio kiel Izraelo en la malnovtestamenta epoko. **Sed tio, kio estas reala kaj dezirinda, estas la konvertiĝo, kiu devus komenciĝi ĉe la unuopulo kaj en la eklezioj por de tie radii en la ŝtaton kaj socion.** Por tiu konvertiĝo, por la „reformacio de la koroj“ povas propravola memdevigo de pluraj unuopuloj esti helpo. Tiel mi finas kun provo de ***„Reformacia deklaro en la jaro de Lutero“*** (kiu neniukaze estu limigata je tiu ĉi jaro):

„Mi alproprigas por mi la enhavon de la novaj 95 tezoj. Per la graco de Dio kaj la helpo de Dio mi alprenas devon, resti fidela al la Sinjoro kaj savanto Jesuo Kristo, kontraŭstari la tempospiriton kaj laŭeble multajn homojn alvoki por postsekvi Jesuon Kriston. Tio interalie signifas,

- ke mi legante la Biblion kaj preĝante restas en kontakto kun Dio kaj mi lasas de Li al mi donaci plifortigon kaj korektadon;
- ke mi la Biblion alprenas serioze ankaŭ en ĝiaj etikaj kaj al la tempospirito kontraŭaj eldiroj kaj provas laŭ tio vivi;
- ke mi serioze alprenas mian kristanan devon, ĉiujn instruajn kaj privivajn asertojn ene de mia komunumo kaj eklezio kontroli surbaze de la Biblio kiel la mezuro;
- ke mi pri la kontraŭbiblia evoluo ne silentas;
- ke mi la kontraŭevangeliajn agadojn, senrigarde de kiu iniciatataj, nek idee nek finance subtenas;
- ke mi staras malantaŭ la kunlaborantoj de mia eklezio, kiuj pro sia sinteno kaj veka anoncado ricevas problemojn fare de la estraro;
- ke mi min mem engaĝas por misieca konstruado de la komunumo kaj por la biblifidelaj faroj kaj komunumoj – kaj Dio min helpu en tio.  Amen.“

# Supervenki la memdetruon de la kristana mondo



*El la prelego de prof-o dd-ro Georg Huntemann*
*dum la kongreso „Reformation heute“ (La reformacio nun)*

*La memdetruado de la kristana mondo komenciĝas per la malobeo al la vorto de Dio.* Unu el gravaj ekleziaj viroj antaŭ nelonge skribis publike pri la signifo de la Biblio en la evangelia eklezia kristana sfero nuntempe: „El unu libro kun la revelaciita instruo fariĝis biblioteko de homaj skribaĵoj kun tempe kondiĉitaj, daŭre sin ŝanĝantaj kaj reciproke sin oponantaj eldiroj.“ La Biblio tiel ŝajnas esti por la pripensema kaj pense kuraĝa kristano de nia tempo nur tempe kondiĉita kaj kontraŭdira libro. Mi demandas, kial ĝi do kuŝas sur la altaro? Kial oni do referencas je ĝi?

La tre signifa kaj aktuala viro de la eklezio, altrenoma, Günter Kegel, opinias, ke oni devus la principon de la Skribaĵo, laŭ kiu la eklezio en ĉio, kion ĝi instruas, referenci je la Biblio, aboli. Li opinias, ke tiamaniere defalus la premo uzi maskadon en la interpretado. Ankaŭ ia mezo de la Skribaĵo, el kiu on ovus la aliajn, malpli gravajn partojn de la Biblio interpretadi, principe ne troviĝas (kvankam ĉiuj ekleziaj estroj kaj teologoj pri tio parolas).

Kaj nun venas la ŝokanta afero: Se oni konjektus la senerarecon de la Biblio, daŭrigas la teologo el la regiono de Rhein, tiam „la tuta akademia teologaro estus unu nura bando de misinstruistoj“. Kaj se oni niatage konsekvence, surbaze de la eldiroj pri la Biblio kaj de la konfesado realigus la instruan disciplinon, tiam tiu proceso fariĝus „la tribunala kondamno super larĝaj partoj de la germanaj teologiaj profesoroj“. Tion diras la en la ekleziaj rondoj alte renoma teologo. Mi ripetas, ne mi tion diris, sed la viro de la eklezio.

Se ni tion resumas, tiam do la tuta „ligo“ de teologoj vivas ekster la legaleco, valida en provincaj eklezioj, kontraŭstaras la enhavojn de la Biblio kaj la devigajn ekleziajn konfesojn kaj devus verdire esti pere de la edukpuna procesoesti eksigitaj de sia servo. Sed oni tion ne faras. Tro multaj jam estas, kion do fari? Kiu ankoraŭ pretus repliki la aserton, ke al la evangeliaj provincaj eklezioj minacas memdetruo? Ĉu do estu neeble ĉi tie paroli pri perfido je kristaneco, verdire pri la perfidita religio? Ĉu tiel en la eklezio ĉio estas ebla? Ĉu oni povas kredi ion ajn, prediki ion ajn, mesaĝi kaj fari ionajn? Ĉu neniaj limoj plu estas donitaj?

Nun ni devas iri pli profunden, ja ni ne povas nur skoldi. Kiu baza punkto de la evangelia kristaneco estis ĉi tie brutale detruita? Ekster iu ajn diskuto troviĝis unu el la kernaj specifoj de la reformacio: ke la kristanaj homoj rajtas agnoski neniun alian aŭtoritaton, ĉu papon, ĉi koncilion, kiu sin pozicius super la vorto de Dio. Estis ĝuste tiu ĉi ligo inter la konscienco kaj la vorto de Dio, kiu igis Luteron ekkrii antaŭ la regna kunveno en Worms 18-an de Aprilo 1521. Ja tiam temis ĝuste pri tio, ke nek la papoj aŭ koncilioj aŭ sinodoj aŭ prepostoj aŭ episkopoj aŭ teologiaj profesoroj aŭ superaj ekleziaj konsilantoj aŭ superintendentoj povas difini, kiamaniere ekspliki la vorton de Dio. La mezurŝnuroj pri la rilato al la biblia vero tiel ne povas esti streĉitaj de iuj ajn institucioj aŭ oficoj. Tio estas la baza leĝo de la reformacio.

Kaj mi demandas nun ankaŭ rigarde al tio, kion Lothar Gassmann kaj aliaj renkontis: Kie restas tiuj en 1934 kontraŭ la nazia ideologio formulitaj frazoj de Barmen, kie staras skribite: „Ni obĵetas la falsan doktrinon, ke la eklezio povus kaj devus kiel la fonto de sia anoncado ekster kaj apud la vorto de Dio agnoski ankaŭ aliajn eventojn kaj potencojn, estaĵojn kaj verojn kvazaŭ la revelacion de Dio. Ni obĵetas la falsan doktrinon, kvazaŭ la eklezio la eklezio rajtus per formado de sia mesaĝo kaj de sia ordo laŭ sia plaĉo sub la ŝanĝado de la de ĉiam regantaj mondperceptaj kaj politikaj konvinkoj. Kaj ni obĵetas la falsan doktrinon, kvazaŭ la eklezio povus kaj rajtus ekster sia servo estrojn kun regecaj komisiitecoj.

Tiel verdire jam io estis iam dirita. Kaj kio mankas? Antaŭ la kreskanta mem-

detruo kaj ekskristaniĝo en Germanio kaj en Eŭropo mankas la *kontraŭstara batalo*. Ni kontraŭstaras, jes, ni ĉi tie vere. Ni insistas, cetere ni ne estus venintaj ĉi tien. Sed troviĝas ankaŭ multaj, kiuj nomigas evangeliecaj kaj prenas sin por piecaj, sed ili ne insistas. Al tiuj mi dediĉas ĝenerale mian tute apartan atenton.

La historio de la kristana kredo estas la historio de la konfrontiĝo kun la kontraŭstaro de la mondo kaj kun la defalo de la vero kaj de la eklezio. Moseo batalis kontraŭ sia popolo kaj por ĝi. Li ne batalis nur kontraŭ faraono por la eliro el Egiptujo, sed li ankaŭ kunpistis la oran bovidon, kiun la obstina popolo ĉirkaŭpalpis kiel sian videblan idolon, ĝin alpreĝis kaj volis ĝin procesie porti sur siaj manoj. La profetoj de Izraelo ne disputis per memelektitaj, sed per la revelaciitaj vortoj por la honoro de Dio kaj por Lia justeco. La profetoj minacis per anonco de juĝoj kaj punadoj, per kio antaŭ ĉio devus esti rompita la orgojla aroganteco, ankaŭ tiu de la tn. piecaj, kiuj ne volis batali. La profetoj ne estas plenumantoj de la interesreligiemo, alcelanta pacon. Ili vendadas neniajn revojn kaj ilusiojn, sed batalas kontraŭ certa religieco, kiu la vorton de Dio volas forgesigi. Kaj en la Nova Testamento oni vidas Jesuon en batalo kontraŭ la farisea kaj sacerdota pieco. Li demaskigas la hipokritecon de la fariseoj kaj per perforto purigas la templon.

Tenu ni do al la piecaj, kiuj ne volas batali, tion ĉi antaŭ iliaj okuloj kaj oreloj: Jesuo konfesas aperte, ke li ne estis veninta por alporti pacon, sed la batalon kaj la glavon. Nome, pro li tien ĝis en la familion, la batalon inter la mensogo kaj vero, ke ĝi ekflamu (komp. Mat 10,34). Kaj la apostolo Paŭlo tion scias kaj tion sendube mem spertis, ke la bona mesaĝo de Jesuo, de Kristo, ne povas esti anoncata sen la batalo. Li parolas pri „la bona batalo de la fido“ (1 Tim 6,12). Kaj Paŭlo ankaŭ scias, ke li finfine ne kontraŭ la karno kaj sango, sed kontraŭ la lastaj konsekvencoj, kontrŭ la malbono mem devas batali. Kaj li petas la komunumon, ke ili staru malantaŭ li dum tiu altaskigita batalo per siaj preĝoj. En la evangelio laŭ Johano oni povas legi, ke la lumo brilas en la mallumo, sed ke la mallumo ĝin ne povas supervenki (Joh 1,4s.). Tiu ĉi de la modernaj teologoj niatage tiom negita poluseco inter la ĉielo kaj la infero, lumo kaj mallumo, graco kaj juĝo, estas la karakterizaĵo de la biblia kredo de Moseo ĝis Jesuo kaj ĝis Paŭlo. Kaj el tiu ĉi poluseco estiĝas ĉiam denove la batalo, ĝis la mondo troviĝas.

Kaj nun mi volas tute persone el la profundo de mia koro konfesi: La evangeliistoj kaj la paroĥestroj, kiuj en la eklezio, sur la misia kampo aŭ en la preĝsalono al la kunvenintoj Dion vendadas kiel „kristnaskan avon de la mondo“ aŭ kiel idilion, kaj Jesuon kiel „metafizikan paskoleporon“, parolas preter la kristana vero. La ĉiam ridetantaj evangeliecaj publikoastroj, kiuj en iaspeca interesreligieco el Dio faras la projeksian ekranon de plene homecaj bezonoj laŭ la egoisma mem-

realiĝo kaj tiel evitas la konfrontiĝon kun la memdetruado de la kristaneco jam dekomence, ĉar ili sian religian klientaron volas reteni ĉe si kaj tiel ne nur parolas preter la kristana kredo – ili ĉirkaŭiras la veron pri la kruco kaj la doloro de la novnaskiĝo. Ili ne povas trapasi.

Kial ili ne povas trapasi? Ĉar ili ne estas vunditaj. *Nur kiu per la memtedtuo de la kristaneco interne profunde estas vundita, tiu povas ankoraŭ trapasi kaj tiu trapasos*. La elektronike plilaŭtigitaj sunnyboys inter la evangeliistoj devus el la 95 tezoj de Lutero 1517 aparte rememori tiun ĉi: „Ke tiel ĉiuj profetoj malaperu, kiuj ĉi tie diras al la komunumo de Kristo: ‚Paco, paco, kaj tamen ne estas paco'. Bone tamen fartu la profetoj, kiuj al la komunumo de Kristo diras: ‚Kruco, kruco, kaj tamen neniu kruco'. Oni devas la kristanojn admoni, ke ili sian kapon Kriston tra la kruco, morto kaj infero postsekvu kaj pli sin apogu, tra la plago en la ĉielan regnon enpaŝi ol en la senbrida sensencaĵo, ke estu paco" (Tezoj 92 ĝis 95). Temas pri la atestado kaj ne pri tio, ke ni pere de la „glatigo" kiel la kritikisto de la kristana mondo Franz Bubel foje esprimis, fariĝi „everybodys darling".

Kion tiu ĉi konfrontiĝo signifas tute konkrete, praktike, en la senco de la Nova Testamento kaj de la reformatoroj? Unue tio ĉi estas sensenca parolo, esprimiĝi pri la sentimaj kristanoj tiom longe, ĝis troviĝos sentimaj komunumoj, kiuj mem elektos siajn pastorojn, sed ilin ankaŭ forsendos, kaj siajn diservojn kaj ilian ordon mem difinos (sen interveno de iu centra ofico kun ekleziaj oficistoj). Luther volis baze memstarajn komunumojn, kiuj mem elektas pastorojn kaj enketas la instruon. Kaj la kalvenistoj evoluis tiun ĉi intencon ankoraŭ pli kaj ĝin realigis. Ni ankaŭ niatage estas memorigataj pri tio, kion la konfesia sinodo en Emden 4-an de Oktobro 1571 decidis en Germanio, staranta sub la kruco, kaj en la lokaj eklezioj dise en Germanio kaj Orienta Frislando la reformitaj eklezioj:

„Neniu komunumo rajtas super iu alia komunumo alproprigi al si neniun prioritaton aŭ superecon, neniu predikanto super alia predikanto, neniu presbitero super aliaj presbiteroj, neniu diakono super aliaj diakonoj. Ĉiu devas atenti, antaŭ la riproĉo de tiaj pretendoj kaj de provoj, subigi al si la regimenton." Kaj en la unua artikolo tekstas poste, en la alineo n-ro 16: „La servantoj de la vorto estu ekzamenitaj de tiuj, de kiuj ili estis elektitaj. Se la instruo kaj ilia vivo estas aprobataj, tiam ili dum solena preĝado kaj surmetado de la manoj estu konfirmataj en ilia servo."

Sed de tia realo ni estas tre malproksime. La evangeliaj provincaj eklezioj en Germanio  estas pli malpli de supre stirataj provincaj eklezioj, en kiuj ne la komunumoj, sed la altrangaj oficistoj la decidan parolon havas. Oni devas memorigi pri tio, kiel malĝojan sperton la evangelia eklezio havis tiel sub la nacionalsocia-

lismo kiel ankaŭ sub la reala socialismo pro tiuj specoj de hierarkio. Tiuj oficistoj montriĝis ĝuste en rilato al la povo por reteni la tuton, kiel strukturoj de senpovo. Kaj por mi estas malĝoja simbolo, se la eklezia estro portas sian krucon sur la brusto anstataŭ sur sia ŝultro.

La supervenko de la memdetruo konkrete signifas: La koncentriĝo el la fonto de la evangelio ordonas tiun ĉi sistemon, la provinceklezian sistemon, en kiu ni nuntempe vivas, laŭ la slogano „Ĉia povo al la komunumoj!“ rompi. En la komunumoj, kaj nur tie, koncentras sin la korpo de Kristo kiel la frateca komunumo. Ĉi tie ni batalas por la libero, por ke la vero povas survojiĝi. Sed kun tiu ĉi batalo por supervenki la memdetruon la afero ankoraŭ ne estas finita. Tio estus nur la batalo kontraŭ la strukturoj. Sed temas pri io pli esenca.

Nek Jesuo nek la prakomunumoj iam ajn pensis, kredis aŭ asertis, ke tiu ĉi troviĝanta mondo estas kreita tiel, ke ĝi moviĝus por iĝi mondo de paco, justeco kaj protektado de la kreitaro. Oni povas formuli tion ankoraŭ pli akre kaj en plena akordo kun la tekstoj el la Nova Testamento, ke Jesuo kaj la prakomunumo ne kredis en la sencon de tiu ĉi mondo kaj de la vivo en tiu ĉi mondo. Plenumiĝo de la senco en tiu ĉi flanko restas por Jesuo kaj la komunumo ekskluzivita. Sigismundo Freud, la ateisma psikologo, foje per siaj vortoj tion esprimis tiel: „Ne estas antaŭvidite, ke la homo en tiu ĉi mondo fariĝu feliĉa.“ Li pravas. La plenumon de nia vivo ni spertos transe de nia vivo.

Sed ĝuste tio, ke iam nova ĉielo kaj nova tero venos, de la modernaj teologoj kaj pastoroj estas energie obĵetita. Ni do devus kredi en la patrinon Tero. La patrino Tero estus tiel la lasta instanco. La Tero mem estus tiel dio. Ne troviĝus plu Dio en la ĉielo, sed la Tero mem estus dio. Tio estas la eldiro, la lasta eldiro de la moderna teologio pere de forturniĝo pere de la falsifo de la kristana mesaĝo, al ni mesaĝita.

Sed la enhavo de la anoncado de Jesuo male estas la regno de Dio, kiu ne evoluas en tiu ĉi historio, ne en tiu ĉi mondo, sed aperos per totala elrompo el la plej abisma punkto de tiu ĉi mondo, kiam Jesuo venos denove. *Jesuo kaj la komunumo kredis en novan ĉielon kaj novan teron, en kiu la paco kaj la justeco troviĝos ene de la nova kreitaro*. La kristana komunumo vivis en espero kaj certeco, ke ĝi ĉi tie ne havas daŭran lokitecon, sed rajtas esperi je estonta gloro. Tiu ĉi mondo por la prakomunumo estis ĉiuaspekte ne la lasta kaj fina, sed nur, kiel Bonhoeffer tion formulis, la antaŭlasta kaj anticipa realo. Tiu atendo de la lasta tempo ĉe la prakristana komunumo troviĝas tiel forte en la centro de ilia kredo, ke la negado de tiu atendado, kiun ni ĉe la plimulto el la „bando de teologoj“ nuntempe trovas, signifas la forĵeton de la kristaneco en ĝia esenca kerno.

Sed oni nin demandas: Kiamaniere vi vidas la mondon, en kiu ni nuntempe vivas? Kion verdire komprenas la biblia kreadraporto, komenciĝanta per la vortoj: „En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron. Kaj la tero estis senforma kaj dezerta, kaj mallumo estis super la abismo; kaj la spirito de Dio ŝvebis super la akvo. Kaj Dio diris: Estu lumo; kaj fariĝis lumo. Kaj Dio vidis la lumon, ke ĝi estas bona; kaj Dio apartigis la lumon de la mallumo“ (1 Mos 1,1-4)?

Kontraŭe al la modernisma teologio, volanta tiun ĉi teron adori kiel la diecan patrinon kaj la ĉielon negi, ni tamen devas biblifidele kaj realisme konstati: La fakto, ke nur la lumo en la komenca krea faro ricevas la predikaton „bona“, estas la esprimo por la kosma venko super la nokto. Fine de la tempo, tiel antaŭdiras Jesuo, venos nokto, ke neniu plu povos agi (Joh 9,4). Kaj la nova ĉielo kaj la nova tero poste estos la nova tago de la nova kreitaro, en kiu neniu nokto plu estos.

Kaj nun venas la decida afero: La kreitaro, en kiu ni nuntempe vivas, troviĝas inter helo kaj malhelo, inter tago kaj nokto. La mallumo kiel povo de detruo povas tiel enrompi en la mondon kun malsanoj, katastrofoj kaj morto. Per sanigado de la demone poseditaj Jesuo batalis kontraŭ la satana absurdo en tiu ĉi mondo. El tiu sperto Jesuo povas diri, ke li agas, kiel lia Patro ĝis nun agas, nome en la batalo de la kreitaro por supervenki la malbonon, kiu ĉiam denove agresas kontraŭ la kreitaro. La senco de la krea historio en la Malnova Testamento ne estas tiel la respondo al la demando, de kie la mondo venis. Pli temas pri tio, montri, ke tiu ĉi mondo, kiu en sia ekzisto estas minacata per la „maro“, per la kaosa potenco, tamen estas retenata kaj gardata fare de Dio.

Per majestaj bildoj en la Biblio estas montrite, ke tiu ĉi mondo ne estas paradiza mondo, ne estas la patrino Tero, ke ni en tiu ĉi mondo ne trovas plenumon de la senco, sed ke ni en tiu ĉi mondo devas batali flanke de la lumo kontraŭ la kaosa potenco de la malbono, ke ni ĉiam denove estas vundtrafitaj kaj ni devas trapasi. Kaj ke ni kredas en tion, ke estas Dio en la ĉielo, sendependa de tiu ĉi tero kaj staranta super ĝi. **Kaj la katastrofo, la pekohava, la sensenca katastrofo de la moderna teologio troviĝas en tio, ke ĝi volas al tiu ĉi tero, tiu ĉi vivo, tiu ĉi socio atribui sencon, kiun la Biblio al ili ne povas atribui. Tio estas la decida afero.** ***Oni volas preni la ĉielon sur la teron*****.**

Sed la en la Biblio revelaciita Dio – tute kontraŭe al la diaĵoj ĉirkaŭ la malnovtestamenta popolo – ne estas ligata al tiu ĉi tero. Li ne estas la ter-dio. Al la mondoj, eterno, epokoj Li estas la Sinjoro. Ĉar Dio superregas la tempojn de ĉiuj epokoj, Jesaja Lin nomas ankaŭ „la Unua kaj la Lasta“ (Jes 41,4). Ankoraŭfoje: Pro tio estas radikala perverseco en la senco de la Biblio, se la iama episkopino de Hamburgo, sinjorino Maria Jepsen, postulas: „Estu subigataj al la Tero!“ Tio estas

la plej abomena provoko de la kristaneco, kian oni povas imagi. *Ni ne estas subuloj de la Tero, ni estas la subuloj de la ĉiopova Dio en la ĉielo, kiu donas al ni forton, sur tiu ĉi tero ĉiam denove supervenki la vundojn, kiujn ni de la tero ricevas.*

**La *mondkonformiĝo* estas la prakaŭzo de ĉiuj herezaj instruoj**. Tiu ĉi mondo – kaj tion la modernaj teologoj en tiu ĉi degenera diboĉema civilizo ne volas preni por vero – staras en la ombro de la malbono. Tial ni aŭdas la frazon: „Sed la tago de la Sinjoro venos, kvazaŭ ŝtelisto; en tiu tago la ĉielo forpasos kun muĝa bruego, kaj la elementoj brulante solviĝos, kaj la tero kaj la faritaĵoj en ĝi forbrulos“ (2 Pet 3,10). Ĉi tie ne temas pri ne plu aktualaj mitaj bildoj, sed pri la rekono, ke en tiu ĉi mondo la vivo de la homo estas necerta, sed ke ĝi estas ankaŭ enkluzivita en la sekureco ĉe Dio. Ni vivas en batalo. Tiel oni povas kompreni la sencon de la profeta lingvaĵo: „Ĉar montoj forŝoviĝos kaj altaĵoj ŝanceliĝos; sed Mia favorkoreco ne foriĝos de vi, kaj la interligo de Mia paco ne ŝanceliĝos, diras la Eternulo, via Kompatanto“ (Jes 54,10).

Kie ankoraŭ troviĝas spuroj de tiu pieco en la ofice programita teologio de la hierarkoj? La popolo de Dio, Izraelo, kaj la kristana komunumo scias, ke ni de tiu ĉi vivo estis vunditaj kaj ke ni kiel vunditoj trapasos. Kiu parolas pri „laŭleĝe“ aŭ „tempe kondiĉite“, tiu staras flanke de kaoso kaj demona mondo kontraŭ Dio, kiu volas savi la vivon kaj la ordon de la vivo. Vivi en la fido ne signifas, ke oni ĉiam troviĝas *„high“* (alte). Ankaŭ en la vivo de la kristanoj troviĝas vunditoj kaj batitoj, falintoj subraden, sed tiam restas al tia kristano, kiel al Ijob, la certeco: „Sed mi scias, ke mia Liberigonto vivas, kaj fine Li leviĝos super la polvo“ (Ijob 19,25). Ke tiel la povo de la malbono neniam povas havi la lastan, sed ĉiam nur la antaŭlastan efikon, tio estas la espero de tiuj, kiuj postsekvas la Dion de la Biblio.

Oni atentu la realismon, ku respeguliĝas en la vortoj de la psalmo: „Kiu estas por mi en la ĉielo? Kaj krom Vi mi nenion volas sur la tero. Konsumiĝas mia karno kaj mia koro; sed la fortikaĵo de mia koro kaj mia parto estas Dio por eterne“ (Psa 73,25-26). Tiu ĉi biblia realismo estas detruata per teologio, kiu laŭ siaj propraj deziroj kaj revoj kaj iluzioj vivas. Tiu teologio deŝiras nin de la Savanto kaj Venkonto, kun kiu ni nian vivon venke trapasas. En lia persona vivo ĉiu, kiu partoprenas en la kolero de Dio kontraŭ la absurdeco, devos en ĉiu fazo de sia vivo trabatali la sencoplenaĵon. Ĉe tio estas plene egale, ĉu temas pri la amo inter viro kaj virino, ĉu pri politika tasko, ĉu pri certa profesia celo aŭ eblco de interhomaj rilatoj. Ĉiam la forto de la malbono troviĝas en ago kaj volas detrui, kio volas sencohave vivi.

Pro tio la vivo de la kredanta, amanta, esperanta kaj konfesanta homo ĉiam estas

batalo, kiu neniam ĉesas ĝis oni vivas. Kaj tiel tiu homo ĉiam devos sperti, ke ankaŭ la plej bela afero, kiun li dum sia vivo renkontis, ĉiam estas nur la antaŭlasta kaj neniam la lasta donitaĵo. Li ĉiam denove devos sperti kaj malkovri, ke ĉio bona, vera kaj bela, kion li en sia vivo renkontas, tamen ne povas alporti la lastan plenumiĝon de la senco de ties vivo. Ĝi ne troviĝas en tiu ĉi, sed en la transa ekzisto. En la transeco, kiun negis la marksistoj, la komunistoj, la nazioj kaj la modernaj teologoj. ***Atendi la plenumiĝon de la senco en tiu ĉi mondo, preni la ĉielon sur la teron, tio signifas preni la inferon sur la teron***. Ĉar ni tion scias, ni estas nek pesimistoj nek malestimantoj de la mondo. Tion oni ĉiam al ni riproĉas. Tio estas absurdo. Ni cetere estas nur gastoj kaj fremduloj en tiu ĉi mondo, sed ni ĝojas en tiu ĉi mondo, ĉar ni ĉiujn vundojn, kiujn ni de ĝi ricevas, venke trapasas. Ni kredas, nome, en la viron, kiu pendis sur la kruco kaj ankaŭ por ni en la mondo venkis.

Mi resumas nun per kvar punktoj, ĉion diritan:

1.) Per la signovortoj „leĝe“ kaj „tempe kondiĉite“ kaj same per la science tute dubindaj metodoj de la tn. historia kritiko la Biblio en nia tempo estas selektata kaj relativigata, kaj la baza punkto de la reformacia kristaneco, ke la biblia vorto sola estas la bazo de nia kredo kaj la enhavo de la anoncado kaj la mezuro por la bono kaj malbono, estas abolita. La el tio sekvanta proceso de memdetruo de la kristaneco estas tiel radikala, ke ĝi estas unika dum la 2000-jara historio de la kristaneco, kaj mortiga.

2.) La memdetruo de la kristaneco kondukas konsekvence al la memdetruo de la aktuala evangelia eklezia substanco. Kontraŭe al la lutereca kaj kalveneca kompreno de la komunumo kiel la bazo de la evangelia eklezio, nuntempe la burohierarkiaj kaj sinodaj povstrukturoj kaj la ŝtataj teologiaj oficistoj, la sola „bando de herezinstruistoj“ (tiel diras ironie la moderna teologo Günter Kegel) difinas la misvojon de la moderna evangelia kristaneco. Se la Biblio kaj la kredkonfeso de la provincaj eklezioj ne troviĝus nur surpapere de la nun ankoraŭ validaj konstitucioj, sed havus efikan validon, tiam tiuj teologoj (denove laŭ la mematesto de la prominenta moderna teologo Günter Kegel) pri la „juĝkondamno“ super la larĝaj parto de la germanaj teologoj kaj profesoroj. Anstataŭ tio la biblie kaj kredkonfese fidelaj teologaj estas disponigitaj kun la por la reformeca kristaneco parolita primokado kongrua konsciencpremo.

3.) La parolo pri la plenkreska kristano estas nur parolo, ĝis ne troviĝos ankaŭ la plenkreskaj komunumoj, kiuj laŭ la luterana origina kaj neniam forlasita intenco iliajn paroĥestrojn ekzameni laŭ la Skribaĵo kaj kredkonfeso kaj

ilin mem elekti aŭ malelekti kaj la spiritan kaj sacerdotan vivon memstare de la ekleziaj povstrukturoj povus difini. Tiel la solvo tekstas tute modeste: Libero por la komunumoj, por ke la vero ricevu vojon. Kaj: La tuta povo al la komunumoj por la batalo kontraŭ la hierarkiojn, kiuj negas la Skribaĵon kaj la kredkonfeson.

4.) La kerna proceso de la nuntempa memdetruo de la kristana mondo realiĝas nun per revantaj, nerealaj kaj esence matriarke motivitaj iniciatoj, sen la kredo en la revenon de Kristo kaj en la kreadon de nova ĉielo kaj de nova tero ĉi tie, nuntempe nomata „patrino Tero“, por trovi la lastan plenumon de la individua kaj socia ekzisto. Sed tiu, kiu volas preni la ĉielon sur la teron (tion ni en la 20-a jarcento ĝissate konsumis, ĝuste ni en Germanio), preparas sur la mondo inferon. Kontraste al tio instruas la biblifidelaj kaj reformacie pensantaj kristanoj kun Dietrich Bonhoeffer, ke la tuta feliĉo kaj malfeliĉo, la tuta ĝojo kaj tuta doloro en tiu ĉi mondo estas la antaŭlasta kaj neniel la lasta homa ekzisto, kiu nur en la eterno trovos sian plenumiĝon. Tial la kristanoj ne falas en mondpesimismon, sed vivas en ĝoja certecfido, ke ili travivas la antaŭlastan epokon en la lumo de la lasta, alprenante tiel la ĝojon kaj la malĝojon laŭ la vorto de la apostolo: „Ĉar en Li kaj per Li kaj al Li estas ĉio. Al Li estas gloro por ĉiam. Amen“ (Rom 11,36).



*Kongreso „Reformation heute“ en Berlino antaŭ la alnajligo de la novaj 95 tezoj:*

# Returne al la Sankta Skribo



*Alparolo de prof-ino D-rino Eta Linnemann post la fiksigo de la novaj 95 tezoj en Vitenbergo.*

*„Se via vorto plu validi ĉesu, kien kredo sin apogu?“* poetumis Nikolaus Ludwig Graf von Zinzendorf. Sed nun okazas tio terura, abomena, ke ek de nun en la eklezio, ankaŭ en la eklezio, kiu portas la nomon de Lutero, la vorto de Dio ne plu rajtas validi. De kio tio ĉi venas? Antaŭ pli ol 200 jaroj la direktiloj estis metitaj en falsan direkton. Jam tiam oni la konstruaĵon de la teologio ne fundamentis plu sur la vorto de Dio, sed sur la filozofio, kiu kontraŭas Dion. Kaj junaj homoj, naskitaj denove, volantaj servi Dion, estas devigataj lerni tiun ĉi perversigitan teologion.

Faru ni do klarecon pri tio, kio faras la diferencon. La pribiblia kritiko kredas en alian Jesuon ol tiuj, kiuj kredas en la vorton de Dio.

Jesuo estas laŭ la vorto de Dio, la Filo de Dio. Por la pribiblia kritiko la Filo de Dio estas nur senenhava nomo.

Jesuo estas laŭ la vorto de Dio naskita de la virgulino Maria. Por la pribiblia kritiko tio estas pura legendo.

Jesuo estas laŭ la vorto de Dio tiu, kiu faris miraklojn. Por la pribiblia kritiko Jesuo eventuale faris kelkajn psikosomatajn resanigojn, sed li revokis en vivon neniun mortinton kaj li resanigis neniun malsanulon.

Jesuo laŭ la vorto de Dio diris ĉion, kion oni en la evangelioj trovas. Por la pribiblia kritiko li en plej bona kazo diris 15% da tio.

Jesuo laŭ la vorto de Dio por ni iris sur la krucon. Li tie pendis pro niaj pekoj, kaj tio estas la nura bazo, sur kiu Dio povas esti kompata al ni, sur kiu Li povas niajn pekojn pardoni. Sed por la pribiblia kritiko la morto de Jesuo estas nur malsukceso de certa sociala reformisto.

Laŭ la vorto de Dio nia Sinjoro Jesuo releviĝis, kaj se Jesuo ne releviĝus, tiam troviĝus neniu releviĝo por ni, nenia savo, nenia eterna vivo. Laŭ la pribiblia kri-

tiko Jesuo releviĝis en la „vorton de kerygma“, tio signifas, ke tiel longe, ĝis iu homo trovas, „predikanta Jesuon“, tiel longe Jesuo vivas. Ne alie ol ĉe Platono, se oni ties librojn ankoraŭ legas.

Por tiuj, kiuj en la vorton de Dio kredas, Jesuo revenis en la ĉielon. Li sidas dekstre de Dio la Patro, de tie li denove venos por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn. Por la pribiblia kritiko troviĝis nenia ĉieleniro kaj nenia reveno de Jesuo Kristo troviĝos.

**Jesuo do koncernas ĉiun el ni, kaj nia eterna destino estos destinata per tio, kian rilaton ni al Jesuo havas**. Se ni alprenas la valoregan donacon de la savo, tiam ni estas savitaj por eternoj. *Kiu la Filon de Dio havas, tiu la vivon havas*. Sed se ni tion ne alprenas, kion nia Sinjoro sur la kruco por ni faris, tiam ni estas poreterne perditaj.

Sed ĝuste tion, tiun decidan mesaĝon el la vorto de Dio, la pribiblia kritiko ne alprenas. Oni povas dum sia tuta vivo en ĉiu dimanĉo frekventi preĝejon – sed li tie tion ne ricevas scii kaj tiel restas perdita. Tiu horora situacio nun regas en multaj eklezioj. Sed ni devas vere decidiĝi. Oni ne povas havi ambaŭ variantojn. Se oni estas indiferenta pri tio, tion scias eĉ la mondeca magazeno „Der Spiegel“, tiam estos por Jesuo indiferente kaj oni de li tiel adiaŭis.

*Ni devas ŝanĝi direkton, al la vorto de Dio – kaj tio signifas: konscie forlasi la pribiblian kritikon*. Ni bezonas la biblifidelajn altlernejojn, kiel tekstas ene de la novaj 95 tezoj. Ni preĝu por tiu renovigo de la teologio kaj la eklezio!

En la interreto vi povas trovi multajn paĝojn kun la tekstoj, prelegoj kaj filmoj pri la novaj 95 tezoj (en pluraj lingvoj) kaj la novan fiksadon de la tezoj en Wittenberg:


http://l-gassmann.de/95-thesen La novaj 95 tezoj en pluraj tradukoj

https://www.youtube.com/watch?v=8q0c2RSz4vE Filmo pr tezfiksado

http://jeremia-verlag.com/95-thesen-fuer-2017-von-lothar-gassmann.html

La libro pri la nova reformacio: „Neue 95 Thesen für 2017“ de Jeremia-Verlag, www.jeremia-verlag.com

# La libro pri la nova reformacio




El la enhavo:

95 tezoj por 2017

96 tezoj pri eksiĝo el EKD

Kredkonfeso por la biblifidelaj komunumoj

30 konsiloj por la predikantoj de la biblia evangelio

Poŝlibro, 70 paĝoj, 5,80 eŭroj

Mendadreso:

Jeremia-Verlag, Waldstr. 18,

D-72250 Freudenstadt, Tel. 07441-95 25 270 (AB),

Faksilo: 07441-95 25 271, Emailo: [info@jeremia-verlag.com](mailto:info@jeremia-verlag.com)

Hejmpaĝo: [www.jeremia-verlag.com](http://www.jeremia-verlag.com)

La Evangelia Eklezio en multaj landoj el la „Eklezio de la Vorto“ fariĝis „eklezio de vortoj“. Nenio ligvalora plu validas. Ĉio malstabilas. La Evangelia Eklezio en Germanio eĉ volas la reformacian jubileon en la jaro 2017 festi kune kun la Romkatolika Eklezio. En tiu ĉi ŝajne senelira situacio la aŭtoro kun siaj „95 tezoj por 2017“ vokas ĉiujn kredantojn al „nova reformacio“ surbaze de la vorto de Dio, la sola fundamento.

# La internacia eĥo al la novaj 95 tezoj

*Raporto de sac. Kjell Olsen,*
*Durban / Sudafriko*
*la ĝenerala sekretario de*
*„Christians for Truth International“ (kristanoj por la vero internacie) dum la kongreso*
*„Reformation heute“ (reformacio hodiaŭ)*

Estis Marto de la jaro 1996 en Sudafriko proksime al Durban, kie ni aranĝis paroĥestran konferencon pri la temo „Reformacio de la eklezioj“. Psoksimume 1000 pastoroj, predikantoj, evangeliistoj kaj ekleziaj estroj el 14 landoj kaj proks. 50 denominacioj kunvenis. D-ro Lothar Gassmann el Germanio estis unu el la parolantoj. Li kunprenis el Germanio la dokumenton „Reformation heute. 95 Thesen zur Situation von Kirche und Gesellschaft im Lutherjahr 1996“, kiu estis farita okaze de la 450-a datreveno de la morto de Lutero (18-an de Februaro 1996).



Vespere, 5-an de Marto 1996 la ĵus pretigita angla traduko en kruda versio estis disdonita al la partoprenantoj de la konferenco post la prelego de d-ro Gassmann, kaj tagon poste utiligita de ili kun tre forta plimulto kiel rezolucio. Ek de tiam la novaj 95 tezoj estis disvastigtaj preskaŭ en la tuta mondo. (…)

Nun mi parolas pri la internacia eĥo pri la novaj 95 tezoj, kel tio okazis en oktobro 1996. (…)

Tiu ĉi dokumento venas en la tempo ene de la historio de la eklezio, kiam la kristana mondo troviĝas en simila situacio de defalado kiel en la tempo de Marteno Lutero antaŭ la jaro 1517. Anstataŭ la indulgencon de la papo, kiu oni

en tiu tempo havis, nun ni havas „malmultekostan gracon“, per kiu ĉiu peko kaj perversaĵo estas ĉirkaŭkadrigita. La indulgencpropaganda predikanto Johannes Tetzel fartus niatempe tute bone kaj tre verŝajne li farus bonan profiton kun multaj modernaj predikantoj kaj televidaj evangeliistoj. (…)

Antaŭ ĉiu reformacio aŭ revekiĝo troviĝis tempo de mallumo. Kaj tiel ankaŭ en niaj tagoj. (…)

Ni dankas Dion pro la novaj 95 tezoj, kiuj kiel la tezoj de Lutero la unuopajn kredantojn, la ekleziojn kaj la ŝtatojn revokas al pentofaro. Same kiel en la tempo de Lutero la presadtekniko havis altan valoron, por kolporti la tezojn, tio validas ankaŭ nun. Sed la avantaĝo de nia tempo estas la rapideco de la komunikado. Helpe de telefaksilo, emailsendado kaj interreto la tezoj estis disvastigitaj en rekorda tempo.




Kelkajn horojn post la publikigo la 6-an de Marto 1996 ili jam troviĝis en la manoj de miloj da kristanoj mondskale helpe de tiu ĉi komunika ilaro. Kaj nur kelkajn tagojn pli poste iu kristana radiodissendejo preparis telefonan intervjuon kun mi, kaj tiun programon emitis poste 700 aliaj radiodissendejoj en Usono. (…)

Nun sekvas mallonga analizo de la preparado, de la akcepto kaj de la spirita frukto de tiu ĉi dokumento. (…) Momente (Oktobre 1996) la dokumento disponiĝas tradukita en 20 lingvoj: germana, angla, franca, hungara, rusa, hispana, zulua, nederlanda, ĉeĥa, itala, sveda, norvega, afrikansa, portugala, japana, korea, bahasa, greka, pola kaj rumana.

En preparo troviĝas interalie tradukoj en sekvajn lingvojn: araba, dana, finna, slovena, amĥara, serba, kroata, sutha kaj en diversajn lokajn triblingvojn.

Aldone al modernaj metodoj kiel emailsendado, telefaksilo kaj interreto la 95 tezoj estis dissenditaj ankaŭ en la formo de cirkuleroj, gazetaldonaĵoj kaj ĵurnaloj en pli ol 100 landoj. Ni ricevis multajn raportojn, ke la dokumento estis kopiita kaj kolportita de la interesiĝintaj pastoroj, samtiel de diversaj unuiĝoj. La nombro de la kopioj ne povas esti precize kalkulata, sed temas pri milionoj da ekzempleroj. Sekve mi nomas per ŝlosilvortoj kelkajn okazojn de tiu disvastigado per „Christen für die Wahrheit“ (kristanoj por la vero) kaj per aliaj unuiĝoj (la stato:

Oktobro 1996; eld.).

*Eŭropo*: La tezoj estis senditaj al ĉiuj bibliaj lernejoj en Eŭropo.

*Germanio, Aŭstrio, Svislando*: 130.000 ekzempleroj de la tezoj estis ĝis la Oktobro 1996 presitaj. Aldone troviĝis aldonaĵoj kaj separaĵoj en diversaj gazetoj, kiel: IDEA-Spektrum, SIGNAL, DIAKRISIS, Herold Seines Kommens, Licht und Leben; i.a. ĉirkaŭ 2000 tezekzempleroj estis senditaj al ĉiuj evangeliaj paroĥoj kaj predikantoj en Svislando. En Germanio kaj Aŭstrio ili estis – lige kun la alvoko je disputacio, al la publika diskutado – senditaj al ĉiuj evangeliaj paroĥoj kaj ekleziaj prezidantoj, aldone en Germanio ankaŭ al la ŝtatprezidento kaj al multaj politikistoj. Fortan eĥon tio vekis ĉe la kredantoj. Sed insista silento daŭras ĝis nun ĉe la oficialaj provincaj eklezioj.

*Hungario, Rumanio*: Proksimume 3000 tezekzempleroj estis senditaj al ĉiuj hungaraj paroĥoj. La hungara episkopo d-ro Béla Harmati postulis ankaŭ la originan germanlingvan version.

*Hispanio kaj Latinameriko*: La tezekzempleroj estis senditaj per la bultenoj por pastoroj „Apuntes Pastorales“ (22.000 ekz.) kaj „Los Temas“ (20.000) en ĉiuj hispane parolantaj landoj.

*Grekio*: La Libera Evangelia Eklezio en Grekio kolportas la tezojn.

*Skandinavio*: La tezekzempleroj estis represitaj en diversaj amasnombraj taggazetoj („Dagen“ k.a.).

*Ruslando*: La tezekzempleroj estis senditaj al diversaj komunumoj kaj ankaŭ al la studentoj de la kristana universitato de St. Petersburgo.

*Indonezio, Koreio kaj Japanio*: Diversaj kristanaj gazetoj (ekz. la korea „The Christian Times“) publikigis la tezojn.

*Pollando, Ĉeĥio kaj Slovakio*: La tezekzempleroj estis kolportitaj en la komunumoj kaj samtempe publikigitaj en la kristanaj gazetoj.

*La angle parolanta mondo (Grandbritio, Usono, Kanado, Aŭstralio ktp.)*: En Usono interalie la gazetoj „The Herald of His Coming“ (120.000 ekz.) kaj „Christian News“ (Gazeto de la luterana sinodo Missouri, aperanta en 60 landoj) represis la tezojn kaj engaĝis sin forte por ilia disvastigado.

*Francio*: La tezekzempletoj estis senditaj al proksimume 4.600 pastoroj kaj komunumaj estroj.

*Beneluks-landoj*: Konataj personecoj (ekz. teologiaj profesoroj) poziciis sin ma-

lantaŭ la tezojn. Diversaj gazetoj (ekz. la grandeldonkvanta magazeno „Visie“) kaj la radioprogramoj raportis pri tio.

Ĝenerale la tezoj estis de multaj kristanaj grupoj kaj unuiĝoj entuziasme akceptitaj. Kompreneble troviĝis ankaŭ opozicio kaj kritiko. Nun sekvas kelkaj eltiraĵoj el kelkaj de multaj leteroj, telefaksilaĵoj kaj mailoj, kiujn ni ricevis kaj daŭre ankoraŭ ricevas de ĉiuj lokoj el la mondo.

Advokato el Kenio skribas: „Mi estis tre entuziasmigita, kiam mi legis la 95 tezojn de la eldono en Julio fare de ‚Herold Seines Kommens’. Mi centprocente konsentas kun tio kaj volas tion subskribi kaj subteni. Mi volas ankaŭ scii, kiamaniere la 95 tezoj en mia lando estos eldonitaj kaj distribuitaj ĉe la eklezioj.“

Peroĥestro el Sudafriko: „Se la 95 tezoj nur povus esti enbruligitaj nur en la konsciencon de la predikantoj de nia amata lando por tiel reveki la evangelian anoncadon! Mi povas imagi, ke la infero tremas antaŭ tiu ĉi penso. Havu dankon, ke vi ne servas nur al la konscienco de la kristanaj eklezioj, sed ankaŭ kiel profetoj en nia lando.“

Estro de la predikanta fratularo en Filipinoj: „En la nomo de 33 ordinitaj kaj aprobitaj predikantoj de Central Lutheran Disctrict Council ni subtenas la 95 tezojn. Bonvolu sendi al mi pli da kopioj!“

Frato el Orienta Etiopio: „Mi ne povas priskribi, kiel riĉe mi estas benita kaj kiom pli klaran komprenon mi ricevis, leginte vian tekston, kiu alparolas la bezonon de nova reformacio en la eklezio. Karaj amikoj, mi ne disponas pri sufiĉaj vortoj por esprimi, kiel mi tiun ĉi klerigadon aprezas. Mi bezonas aldonajn materialojn por partopreni ĉe tiu ĉi temaro.“

Hindia kredanto, loĝanta en West-New York: „Tre estimataj sanktaj de la Sinjoro, mi plene subtenas la novajn 95 tezojn. Mi petas, insistu en preĝado por mi, ĉar mi momente troviĝas ekster ĉia helpo.“

Profesoro de teologio ĉe la universitato Potchefstroom en Sudafriko: „Mi plene konsentas kun la tezoj kaj mi ĝojas, ke tiel forta mesaĝo estis eltrumpetita. La tezoj 62 ĝis 64 estis por mi aparte gravaj.“

Frato el Gibraltaro: „Mi estas unu el tiuj, kiuj estas menciataj el la 49-a tezo.“

Evangeliisto el Grandbritio: „Bonvolu sendi al mi kelkajn kopiojn, por ke mi povu ilin kolporti inter homoj, kiuj posedas koron por la bibliaj reformoj en niaj eklezioj.“

Fratino el iu evangelia eklezio en Hispanio: „Bonvolu sendi al mi kopiojn en la

hispana lingvo. Tio estas tre grava afero por nia hispana eklezio."

Tre stimule ankaŭ estas, ke la 95 tezoj estu priparilataj, pridiskutataj kaj ankaŭ kritikataj. Mi estus verdire tre malstimulita, se nenia kritiko estus alveninta. Ĉe la kritiko oni vidas, ke la teksto estis prenita serioze.

Pastoro el Sudafriko skribas: „La distinga linio de la moderna teologio ne estas plu la sekularigo. La ideoj, iam antaŭe estintaj centraj por la teologio, filozofio, ekonomio ktp., estas metitaj sub la demandosignon. Larĝa movado de relativismo kaj postmodernismo akiras pli kaj pli da influo. La tempospirito devas esti klare rekonata, por ke ni povu kompreni, kio por la eklezio anonciĝas. Ni devas skribi ion por la nuna generacio. La felsakoj de hieraŭ krevis. Eĉ la mondo vidas tion kaj fabrikas novajn felsakojn, kiujn nur la evangelio denove povas krevigi."

Aperis ankaŭ kritiko, ke inter la tezoj troviĝas nenio pri la temoj, kiel „Izraelo", „la miljara regno" aŭ „bapto". Sed unue en la95 tezoj oni ne povas priparoli ĉiujn temojn. Kaj due la eldoninto devis limigi sin je la plej nepraj demandoj, por tute ricevi interkonsenton.

Kaj fine kelkaj indikoj pri la spirita frukto de la novaj 95 tezoj. Verdire tio por ni estas la plej grava punkto. Ni sentas dankon, ke la disvastigo tiel mirinde sukcesis. Kaj ni sentas dankon pro la akcepto de la tezoj. Sed ne tio estis la kialo, pro kio la tezoj estis dissenditaj.

La kialo estas, ke ni aspiras la reformacion kaj la revekiĝon, senditan de Dio el la ĉielo.

Apud multaj dankleteroj por tiu ĉi dokumento ni tamen ricevis ankaŭ multajn preĝproponojn. Ŝajnas, kvazaŭ la kristanoj al la aŭtoroj de la dokumento sentas konfidon kaj kun ili dividas siajn profundajn plagojn. Ni disponas pri raportoj, ke la tezoj estis utiligitaj kiel materialoj por la bibliaj grupoj, kie kelkaj tezoj posemajne estis studitaj. Kaj kelkaj paroĥestroj utiligis la tezojn kiel materialon por siaj predikoj. Antaŭ ĉio la dokumento revokis la kristanajn estrojn al la reformacio kaj revekiĝo. Kaj mia preĝo estas, ke tio povu fariĝi giganta ondo.

Serioza preĝo, diskuto kaj anoncado, ĉio-ĉi akompanas la 95 tezojn. La tro neglektita temo „pentofaro" denove paŝas en antaŭon. La 95 tezoj de doktoro Marteno Lutero komenciĝis per alvoko al la pento. Do ni preĝu, ke Dio ankaŭ tiujn ĉi novajn 95 tezojn utiligu, por ekleziojn kaj grupojn serioze revoki al la reformacio. Estu, ke la pentofaro kaj la fido en Jesuon Kriston sole povu esti la viva temo por tiu ĉi generacio. Tiel ni preĝu kun Habakuk: „Ho Eternulo, vivigu Vian faritaĵon en la mezo de la jaroj, montru en la mezo de la jaroj, ke eĉ en kolero Vi memoras pri kompato" (H

Aldona rimarko por 2017: Dio sole, la Sinjoro, scias, kio estis atingita dum la pasintaj du jardekoj pere de disvastigado de la novaj 95 tezoj.

## Atentu! La nova Biblio laŭ Lutero 2017 bedaŭrinde estas biblikritike kaj feminisme falsita

(red) Antaŭ nelonge mi elprintis el la Biblio kelkajn versiklojn de la Lutera versio el la epistolo al Galatoj. Nur nun, kiam mi tion pli proksime observis kaj laŭte legis, mi subite rimarkis, ke la versikloj estas falsitaj kaj ke temas pri la nova „Lutherbibel 2017“. Tiel ekzemple anstataŭ „Brüdern“ (fratoj) en la teksto de Galatoj 1,11 estas enformulite: „Brüder *und Schwestern*“ (fratoj kaj fratinoj), kvankam en la greka originalo tiel ne estas skribite. Kompreneble ni ne havas malemon kontraŭ niaj amataj fratinoj, sed la vorton de Dio oni neniamaniere rajtas falsi. Sur la sekva paĝo (bonvolu ĉe serĉado entajpu la paĝon de „Lutherbibel 2017), vi povas trovi bonan kritikan analizon de la Biblio laŭ Lutero 2017 fare de la frato Rudolf Ebertshäuser:

www.das-wort-der-wahrheit.de

Ni planas en iu el sekvaj eldonnumeroj de DER SCHMALE WEG publici elprenaĵojn el tiu ĉi kritiko.

Kiel la vortfidelajn tradukojn ni ankoraŭ daŭre rekomendas la eldonon de la Lutera Biblio, reviziita en la jaro 1912, la nereviziitan version de Elberfelder Bibel kaj la Biblion Schlachter 2000.

# En propra afero

Karaj amikoj, karaj gefratoj,

volonte sciigas ni vin pri tio, ke de tiu ĉi **speciala eldono de „Der schmale Weg“** en la germana lingvo disponiĝas pliaj ekzempleroj por alcelata kolportado, riceveblaj ĉe la adreso de nia buroo (rig. p. 2) surbaze de donacoj. Aparte ni rekomendas al vi la novajn **95 tezojn** (en la meza parto de tiu ĉi eldono), kiujn oni ankaŭ povas akiri en la germana lingvo surbaze de libervolaj donacoj. Same disponiĝas kelkaj aliaj eldonnumeroj de „La Mallarĝa Vojo“ en la germana por akiri. Se al vi mankas unuopaj numeroj, bonvolu demandi ĉe nua buroo.

Kompreneble ĉiuj jarkolektoj de „Der Schmale Weg“ kaj ankaŭ la novaj 95 tezoj kiel *download* disponigitaj en interreto:

http://christlicher-gemeinde-dienst.de/aktuelle-ausgabe
http://l-gassmann.de/der-schmale-weg
http://l-gassmann.de/95-thesen

Okaze de tio ni diras elkoran dankesprimon por ĉiuj donacoj, kiujn ni en la jaro 2016 ricevis de multaj el vi kiel subtenon de nia laboro. Ni povas danki nur al la graco de Dio kaj al via preteco helpi, ke la laboro de la kristana komunuma servo kaj la eldonado de la revuo *„Der Schmale Weg“* dum tiu ĉi ekonomie malfacila tempo tamen povas daŭri.

Multaj alskriboj montras al ni, kiel dankeme la homoj meze de la fintempa malordo akceptas la glaran, biblie orientigon. Ni petas je viaj preĝoj, ke Jesuo Kristo daŭre donacu al ni saĝon kaj povon distingi la spiritojn, por ke lia „malgranda grego“ povu ricevi, pere de laboro de CGD kaj la revuo „Der schmale Weg“.

Jam estas dissendataj la **konfirmoj** por viaj **mondediĉoj** por la jaro 2016. Bedaŭrinde mankas ĉe kelkaj donacsendaĵoj la adreso aŭ la nomo kaj familia nomo ne kongruas kun la adreso. Tial nia peto: Se iu ne ricevis la konfirmon por sia monsendaĵo, bonvolu sin anonci ĉe nia buroo (p. 2).

Ni petas vin, aldoni okaze de via monsendaĵo, vian adreson – gravas precipe la poŝtkodo! kaj vian „amikecnumeron“, kiun vi trovas sur la dorsa paĝo de nia revuo. Nur tiel ni povas vian donacon ankaŭ ĝuste atribui.

Multan dankon por via subteno kaj komprenemo. En ligo pere de amo en Jesuo – *Via Christlicher Gemeinde-Dienst*

*„Tre pura estas Via vorto, kaj Via sklavo ĝin amas.“*
Psalmo 119,140

La vorto, kiun Dio donis, estas la lumo de la vivo.
Legu, studu ĝin, vi ne satiĝos de ĝi kaj vi ne aŭdos ĝin vane.

Ĝi estas perfekta, senerara kaj vera koncerne ĉiujn aferojn,
faras la homon malgranda kaj Dion tiel granda. Kiu ĝin kredas, tiu sukcesis.

Rekonu la aŭtoritaton, kiu al tiu ĉi libro estas atribuita.
Kaj ne fidu al tiu, kiu dubojn semas, volas ion alian montri.

La senerareco de la Skribaĵo devas esti defendata
ankaŭ kontraŭ la atakoj el la infero – nenio pli malbona sur la tero.

La libro de Dio, la vorto de la ĉielo, oni devas ĝin lasi origina.
Kiu ĝin kontraŭbatalas, tiu pereos kune kun la mondo.

Tial firme tenu, kio estas skribita, kion Li revelaciis,
ĉar la nomo Jesuo neniam pereos – tiel vi estos bone gardata.


Sole la Skribaĵo, la vorto de Biblio, sole en la nomo de Kristo,
sole la graco, fido, ĉiam la honoro restas ĉe Dio.
Amen.

Frank Cisonna

# Reformacio hodiaŭ.

95 tezoj pri la situacio de la eklezio kaj socio

*Elplume de D-ro teol. Lothar Gassmann*




***Alvoko por ŝanĝi direkton***

1. Kiam nia Majstro kaj Sinjoro Jesuo Kristo diras: *„Pentu, ĉar la regno de la ĉielo alproksimiĝis“* (Mateo 4,17), tiam li volas, ke la tuta vivo de la kredanto estu pento.

2. Tiu ĉi pento komenciĝas per *nova pensmaniero kaj bedaŭro* pri la ĝisnuna falsa konduto tiel por la unuopulo, kiel ankaŭ por la eklezioj en ilia tuto.

3. Se la pento estas serioza, ĝi kondukas al tio, ke la unuopulo kaj la eklezioj la falsan konduton, la pekon, *malamas kaj forlasas* – ne el propra povo, sed per la graco kaj povo de Jesuo Kristo.

4. Dio promesas al la pentopreta homo *pardonon kaj novkomencon*: *„Se Mi ŝlosos la ĉielon tiel, ke ne estos pluvo, aŭ se Mi ordonos al la lokustoj primanĝi la teron, aŭ se Mi sendos peston sur Mian popolon, sed Mia popolo, kiu portas Mian nomon, humiliĝos kaj preĝos kaj serĉos Mian vizaĝon kaj returnos sin de siaj malbonaj vojoj; tiam Mi aŭskultos el la ĉielo, kaj pardonos ilian pekon kaj resanigos ilian landon“* (2 Kroniko 7,13-14).

### *La nuna socia situacio*

5. La unuopulo tamen plaĉas al si niatempe en pluraj *pekoj,* kiel ekz. sendieco, orgojlo, kruelo, okultismo, malobeemo, abortado, malĉastado, rompo de geedzeco, homseksualeco, misuzo de drogaĉoj, mensogado, avareco kaj ŝtelado (komp. 2 Moseo 20,2-17; Romanoj 1,18-31; 1 Korintanoj 6,9; Galatoj 5,19-21).

6. Kompreneble tiaj pekoj estis faritaj en ĉiuj tempoj, sed nuntempe multaj el ili estas publike tolerataj kaj eĉ starigataj sur podeston: *„Ne nur* (ili) *faras ilin, sed ankaŭ konsentas al la farantoj de ili“* (Romanoj 1,32).

7. En multaj ŝtatoj la *leĝoj* moliĝis aŭ estis abolitaj, laŭ kiuj la blasfemado, pornografio, abortado, eŭtanasio, homseksuala praktikado, misuzo de drogaĉoj kaj similo estis malpermesitaj.

8. La socio, kiu toleras agojn aŭ ilin eĉ publike subtenas, kiujn la Sankta Skribo markas „peko“ kaj „abomeno“ en la okuloj de Dio, fosas sian propran tombon. Ĝi fariĝas *matura* por esti *juĝota*: *„Virto altigas popolon; sed peko pereigas gentojn“* (Sentencoj 14,34).

9. Multaj ŝtatoj similas nuntempe al la Romia Imperio antaŭ ĝia falo: la internaj kaŭzoj de ĝia disfalo estis la *morala dekadento*.

10. Estas nur plu demando de la tempo, ĝis ankaŭ en niaj tagoj la ŝtataj kaj sociaj sistemoj, kiuj sin kontraŭ Dio poziciis, *disfalos*.

### *La malsukceso de la eklezioj*

11. En tiu ĉi situacio devus la eklezioj (provincaj, kantonaj kaj liberaj) surloke kaj mondskale ekkonscii pri sia senditeco, esti *„lumo“* kaj *„salo“* kaj kontraŭstari tian evoluon de la aferoj (Mateo 5,13; Romanoj 12,2; Efesanoj 5,11).

12. Se ili tion ne faras, tiam ili staras sub la juĝo, kiun Dio eldiras pri la *malfidela gardanto*: *„Kiam mi diros al malpiulo: Vi devas morti, kaj vi ne admonos vin, kaj vi ne parolos, por averti malpiulon kontraŭ lia malbona vojo, por konservi al li la vivon – tiam li, malpiulo, mortos pro sia malpieco, sed lian sangon Mi repostulos el via mano“* (Jeĥezkel 3,18).

13. Unuopaj personoj kaj grupoj interne de la eklezioj proponas kontraŭ la tempospirito bravan kontraŭstaron, sed diversaj eklezioj kiel la *tuto* en multaj ŝtatoj ĉiam denove falas de sia senditeco, anonci la evangelion kaj defendi la ordonojn de Dio.

14. Disponigita al la ideologioj de la tempospirito tia eklezio perdas sian *orientiĝon*.

15. *Eklezio* sen orientiĝo ankaŭ al la unuopa *persono* ne povas doni orientiĝon.

### *La distanciĝo for de la Sankta Skribo*

16. La senorientiĝo komenciĝis per la distanciĝo for de la *bazo* de la tuta kredo kaj rekono, de la Sankta Skribo.

17. La Sankta Skribo nur *laŭekstere* en multaj eklezioj daŭre estas uzata, tamen ĝi ofte estas subigata al la tiranio de la aŭtonoma, memglora *racio*, kiu ĝin dismetas kritike en ĝiajn elementojn kaj la revelacion de Dio negas.

18. Prave preĝas Zinzendorf: „Se *via vorto* ne devus plu validi, sur kio do povus la kredo sin apogi? Min ne fascinas mil mondoj, sed nur vian vorton plenumi."

19. Ĉar la eklezio el la reformacia vidpunkto estas *„kreaĵo per la vorto de Dio"*, tial ĝi ĉesas tio esti, se ĝi forlasas la vorton de Dio.

20. Se oni adiaŭas de la vorto de Dio, tiam oni ne bezonas miri pri la sekvoj: la distanciĝon de la *vorto* de Dio sekvas la distanciĝo de la *enhavoj* de tiu vorto – kaj tio signifas la disfalon de la biblia instruo kaj de la laŭbiblia vivo.

### *La disfalo de la biblia instruo pri Dio*

21. La disfalo de la biblia instruo komenciĝas kun la disfalo de la biblia kompreno pri Dio. Kontraŭ la klaraj eldiroj el la Sankta Skribo multaj „teologoj" la *triunuan eston* de Dio kaj lian *ĉiopovon*, lian *sanktecon* kaj *justecon* negas aŭ ĝis nekomprenebleco misinterpretas.

22. Kiu obĵetas, ke en la Biblio atestitaj *mirakloj kaj profetaĵoj* vere realiĝis aŭ ankoraŭ realiĝos, tiu imagas Dion kiel senpovan principon – metafore dirite: „sen manoj kaj piedoj“. Tia „dio“ tamen estas memproduktita idolo, dio de la raciismaj filozofoj, sed ne „Dio de Abraham, Isaak kaj Jakob“, la Patro de Jesuo Kristo (Blaise Pascal).

### *La disfalo de la biblia instruo pri Kristo*

23. Se nuntempe certaj „teologoj“ asertas, ke Jesuo Kristo estas nur *homo*, socia revoluciulo, pacpredikanto, liberiganto aŭ simile, sed ne Dio – kaj plie: li laŭ ili estis nek naskita de virgulino nek li resurektis el la mortintoj nek li leviĝis en la ĉielon nek li denove venos vidata kun potenco kaj gloro – kaj plie: lia morto sur la kruco ne povas nin savi de niaj pekoj, tiam ni devas koncerne ĉi tion konstati sekvon: nome, ke la en la kvara jarcento post Kristo kondamnita konata hereza instruisto *Arius* tamen pli bone instruis ol kelkaj „modernaj teologoj“, ĉar li Jesuon tamen ankoraŭ perceptis *„supernatura Logos (vorto)“* kaj ne simple homo. Sed ĉiuj misinstruoj portas en si tendencon per sekvaj paŝoj antaŭen pligrandiĝi.

24. Kontraŭ Arius kaj multaj „modernaj teologoj“ oni povas diri: Jesuo Kristo ne estas nur *simple homo*, ne estas *kreito* de Dio, sed *vera homo kaj vera Dio samtempe*, la eterna *Filo de Dio*, tio signifas: Dio mem en la dua persono de sia triunueco. *„Kiu havas la Filon, tiu havas la vivon; kiu ne havas la Filon de Dio, tiu la vivon ne havas“* (1 Johano 5,12; komp. 1 Johano 2,22; 4,2s).

### *La disfalo de la biblia instruo pri peko kaj savo*

25. Kie la biblia instruo de *Kristo* estas malplenigata, tie ankaŭ la biblia instruo pri *peko kaj savo* estas malplenigata. Ja Kristo „senpova“ ankaŭ ne havus povon nin savi de pekoj, morto kaj diablo.

26. Sekvo estas, ke aŭ peko estas prezentata negravaĵo kaj la valido de la ordonoj estas negata – aŭ la savo estas ĉu plene ĉu parte metata en la manojn de la homo mem (*memsaviĝo* aŭ *sinergismo*).

27. La sengravigo aŭ *negado de peko* en la biblia senco nuntempe montriĝas per diversaj perceptoj en la socio kaj en la eklezio, ekz. per asertado, ke la praktikata homseksualeco nek estas peka nek malsaneca, ke pornografio, abortado kaj eŭtanasio ne estas kondamnendaj kaj ke liberaligo de drogaĉvendado kontribuus en la batalo kontraŭ la krimoj. Tamen *„Ve al tiuj, kiuj la malbonon nomas bono kaj la bonon malbono, kiuj mallumon faras lumo kaj la lumon mallumo, kiuj maldolĉon faras dolĉo kaj la dolĉon maldolĉo“* (Jesaja 5,20).

28. La *memsaviĝo* estas publike kaj plifortigite propagata en diversaj „modteologioj“, ekz. en certa feminisma „sang-teologio“, kiu atendas saniĝon el la fortoj de virino kaj ŝia menstruala sango anstataŭ de Jesuo Kristo; en certa „liberiga kaj revolucia teologio“, kiu sian esperon orientigas al la forto de la sociaj grupoj kaj ilia batalo; kaj en certa „psiko-teologio“, kiu la saniĝon atendas el la forto de la homa memo kaj konvenaj teknikoj, kiuj devus servi al la memrealiĝo de la homo.

29. Tamen ankoraŭ ĉiam validas, ke *„en neniu alia“* krom Jesuo Kristo *„estas savo; ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo, donita inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj“* (Agoj 4,12).

***La enpuŝiĝo de fremdaj spiritoj en la spacon de la eklezioj***

30. Ju pli certa eklezio asimiliĝas al la *tempo-spirito*, tiom pli ĝi troviĝas en danĝero, ne nur elpeli el la mezo la *Spiriton de Dio*, sed ankaŭ la *fremdajn spiritojn* venigi tra la malantaŭa pordo.

31. Tiuj fremdaj spiritoj regadas en la *ideologioj* kaj *religioj* de tiu ĉi mondo (Efesanoj 6,12).

32. Kiam oni asertas, ke la fremdaj spiritoj estas identaj kun la Spirito de Dio, tio montras la grandan malheliĝon de nia tempo. Ja daŭre validas: *„Sed mi diras, ke tion, kion oferas la nacianoj, ili oferas al demonoj, kaj ne al Dio“* (1 Korintanoj 10,20).

33. Kiam dum interreligiaj „preĝ-renkontiĝoj“ ĉiam denove estas laŭdata „la spirito de Asizo“ (t.e. de la „porpaca preĝo de religioj“ en Asizo en la jaro 1986), tiam la organizantoj de tiu renkontiĝo devus alaŭskulti la por la kristana mondo donitan biblian versiklon: *„Mi estas la Eternulo, via Dio ... Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi“* (2 Moseo 20,2s).

*La mondiĝo de la eklezioj*

34. Multaj homoj, inter ili kelkaj politikistoj, atendas *klerigan vorton* de la eklezioj pri la Sankta Skribo.

35. Sed ju pli „tempokonforma“ kaj „mondaperta“ tiu aŭ tiu eklezio volas esti, ju pli ĝi troviĝas en danĝeo, sian *esencan* vorton forgesi, kiun ĝi ŝuldas al la grandparte ateisma kaj malcerta loĝantaro.

36. Eklezio, kiu adaptiĝas al la spiritoj de la tempo kaj al la tagsloganoj de la politiko dekstre kaj maldekstre, ne povas plu efiki en la mondo ĝin ŝanĝante, sed ĝi estas fortrenita fare de la suĉforto de la mondo. Ĝi falas en *mondiĝon* kaj faras sin mem superflua.

37. La *elireblo* povas troviĝi nur en tio, ke oni pentas, tute nove alaŭskultas la vorton de Dio, kiu al ni estas donita en la formo de la Sankta Skribo, kaj ĝin diradas al la mondo per vorto kaj ago.

*La konduto de la kredantoj konfronte al la ĉeestanta juĝo*

38. Ke al multaj eklezioj nuntempe mankas la forto kaj klareco por la biblie ankriĝintaj instruaj kaj vivaj esprimiĝoj, jam estas *juĝo de Dio* (1 Petro 4,17) kaj efektiviĝo de la fintempa *defalo* de la savanta kredo (Meteo 24,12; 2 Tesalonikanoj 2,3).

39. Eklezio, kiu pli kaj pli fariĝas *malĉastulino*, pli kaj pli similas al la mondo, miksas la idolanajn idolojn kun Dio de la Biblio; aspiras al mono, povo kaj mondeca agnosko, malmulte observas la ordonojn de Dio kaj la savon per Jesuo Kristo kaj kunprenas la verajn kredantojn en plagon (Apokalipso 17s.).

40. Tamen la *kredantoj* estas vokitaj daŭre kredi, ami kaj esperi, kiel ankaŭ *preĝi* por siaj kalumniantoj kaj persekutantoj, por ke ankaŭ tiuj trovu la vojon al pentado (Mateo 5,44).

41. Sed antaŭ ĉio la kredantoj estas vokitaj resti al la Sinjoro kaj Savanto Jesuo Kristo *fidelaj*, ke ili kontraŭstaru ĉiun spiriton de konfuzo kaj mondadaptiĝo kaj laŭeble multajn homojn voku por postsekvi Jesuon Kriston: *„Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn“* (Mateo 28,19).

***Insisto ĉe la misia taskigo***

42. La misia taskigo iras paralele al la devojigo kaj finiĝos nur, kiam Jesuo venos denove en potenco kaj gloro (Mateo 24,14). La misio (en la senco de konvertiĝo de la nekredantoj al Jesuo Kristo) estas la *pozitiva respondo* de la kredantoj al multaj devojigoj.

43. La misio estas la vivspiro de la eklezio. Sen la misio mortas la eklezio. Troviĝas nur alternativo: *„misio aŭ morto"* (Otto Riecker).

44. Kie certa eklezio kiel tuto ne pretas aŭ ne povas plu alpreni la taskigon de la misio, tie la unuopaj kredantoj estas alvokitaj per liberaj fondadoj aŭ per subtenado de la biblifidelaj *misiaj laboroj* tiun servon plenumi.

45. Pere de la servo de la biblifidelaj misiaj laboroj povas establiĝi *novaj* komunumoj kaj eklezioj, kiuj subkondiĉe povas anstataŭi la ekleziojn, kiuj defalis de la kristana kredo.

***Demando pri eksiĝo el eklezio***

46. La unuopa kredanto estas alvokita surbaze de la Sankta Skribo mem kontroli, en kioma mezuro ties komunumo kaj eklezio staras sur la fundamento de la vorto de Dio aŭ ne plu staras.

47. Kie oni ekkonas deflankiĝojn kaj misaĵojn, oni devas tion publike en sia eklezio nomi. Se temas pri gravaj misaĵoj kaj ili spite al pluraj protestoj ne estas forigitaj, oni povas nur plu suferi aŭ eksiĝi el tia eklezio. Kiel longe oni povas, oni devus tamen ne eksiĝi, sed *„sin esprimi"*.

48. Misaĵoj tamen povas iĝi tiom grandaj, ke por kredanto el la kialoj en ties konscienco kaj pro ties obeo al la Sinjoro Jesuo Kristo eksiĝo fariĝas *neevitebla* – nome tiam, kiam la eklezio kiel tuto promulgas leĝojn, kiuj la herezon kaj la pekon nomas bona kaj deviga afero.

49. Se kredanto eksiĝas el la eklezio, kiu per siaj bazaj punktoj kaj vivesprimoj tre distanciĝis de la Sankta Skribo, tiam li povas havi certecon, ke li *ne* eksiĝas el la eklezio de Jesuo Kristo, sed nur el institucio, kiu sin kontraŭrajte nomas „eklezio".

50. La vera eklezio (la komunumo de Jesuo Kristo), kiu ankaŭ ne estas perfekta, sed kies membroj tamen klopodas vivi el la forto de Kristo kaj kongrue kun la instruoj de la Sankta Skribo, vivas ekster de tiu institucio daŭre kaj trovas novan formon de sia komunuma formiĝo. Kaj nur por ĝi validas: *„Kaj pordegoj de Hades ne superfortos ĝin“* (Mateo 16,18).

### *La fundamentoj de reformacio de la eklezio*

51. Egale en kiu eklezio certa kredanto troviĝas – *ĉiu* eklezio bezonas reformacion en la senco de spirita renoviĝo. Tiu tamen ĉiam povas komenci nur ĉe la unuopulo: pere de la rekono de persona kulpo kaj nekapablo kaj nur pere de la fido en la gracon kaj forton de Jesuo Kristo.

52. *Sole Jesuo Kristo* devus esti la Sinjoro, ne aliaj sinjoroj, ne la fondintoj de religioj aŭ ideologioj.

53. *Sole la vorto de Dio,* kiu troviĝas en la Biblio, devus validi, ne aliaj vortoj, revelaciaj fontoj kaj ideologioj.

54. *Sole el la graco kaj el la fido* ni estos savitaj, ne pere de la memsavaj teknikoj, imagoj pri reinkarniĝo kaj pere de la aŭdaca provo, la kompleksan savstaton (ŝalom) de la estonta Dia Regno per revada atendado je la tutmonda paca regno, aranĝota el propra homa forto.

55. *„Jesuo Kristo,* kiel Li estas por ni atestita en la Sankta Skribo, *estas la unuela vorto de Dio*, kiun ni devas aŭdi, al kiu ni devas en vivo kaj mortado fidi kaj obei. Ni obĵetas la falsan instruon, laŭ kiu la eklezio povus kaj devus kiel fonton de sia anoncado ekster kaj apud tiu unuela vorto de Dio agnoski kiel la revelacion de Dio ankaŭ aliajn eventojn kaj fortojn, imagojn kaj verojn“ (punkto 1 de la teologia klarigo de Barmer el la jaro 1934).

### *La aŭtenta kaj la falsa unueco*

56. La aŭtenta reformacio en la senco de spirita renoviĝo iras tra la pento kaj ŝanĝiĝo de multaj *unuopuloj* al nova *komunumo* en la spirito – unue nevideble, sed poste ankaŭ pli kaj pli videble.

57. La *disharmonio* de la kredantoj en pluroble inter si batalantaj grupoj kaj grupetoj estas malobeo rilate al Dio, hontaĵo antaŭ la mondo kaj lamigo de la misia taskigo (komp. Johano 17,20s.). Tio tamen ne devas esti nevenkebla malhelpo, se la kredantoj sin orientigas je la centro de la evangelio, la pravigo de la pekulo sole el la graco kaj tiel malkovras sian *unuecon en la esencaj aferoj*: „En la esencaj aferoj unueco, en la neesencaj aferoj libero, sed super ĉio la amo."

58. La tra Dia vorto kaj pento efektivigata unueco de la kredantoj ne povas esti kaj ne estos unueco koste je la biblia vero, sed ĝi estos la *unueco en la vero de Kristo* (Johano 14,6; 17,11; Efesanoj 2,14).

59. *La aŭtenta unueco* inkluzivas nur tiujn, kiuj en Jesuon Kriston kredas, kiuj lian vorton kiel „la veron" retenas, kiuj en la mondo, sed ne de la mondo estas kaj kiuj tiel de la mondo estas malamataj (Johano 17). La *falsa unueco* inkluzivas la tutan homaron, „malĉastas" kun ĉiuj eblaj ideologioj kaj religioj kaj persekutas tiujn per devigoj, teroro kaj fine perforto, kiuj al Jesuo Kristo kiel la unuela Sinjoro kaj alportanto de la paco fidelaj restas (Apokalipso 13 kaj 17s.).

60. *La aŭtentan unuecon* Dio donacas pere de misia agado kaj evangelizado inter ĉiuj gentoj, per klara alvoko al la savanta fido kaj al la disponigo de sia vivo al Jesuo Kristo (Mateo 28,18-20; Johano 17,6ss.). La *falsa unueco* tiun ĉi alvokon al konvertiĝo ĉirkaŭiras, starigante la politikajn problemojn kaj la memsavajn provojn de la homaro, sin komprenanta kiel aŭtonoma kaj sin mem en la unuan vicon – de la homaro sen Dio, kiu *„ne ricevis la amon al la vero por esti savitaj"* (2 Tesalonikanoj 2,10).

61. *La aŭtenta unueco* toleras nenian herezaĵon (Galatanoj 1,6-10; 2 Johano 9-11; Judas 3ss.). La *falsa unueco* toleras herezaĵojn kaj ilin eĉ aldone subtenas pere de miksado inter la ideologioj kaj religioj.

### *La renovigo de la teologio*

62. Por la reformacio en la senco de la spirita renoviĝo la renovigo de la *teologio* estas nepra.

63. La *renovigo de la teologio* povas okazi nur, se dum la teologia edukado la Biblio denove estas prenata serioze kiel la vorto de Dio, kaj la homa racio subigas

sin sub ĝi kun estimo kaj diotimo.

64. La *biblifidela edukado* – kaj tio signifas: fondado kaj agnoskado de la biblifidelaj edukejoj (lernejoj, bibliaj lernejoj, seminarioj, studdomoj, akademioj kaj altaj lernejoj) – estas tiel neevitebla.

### *Praktikado de la edukado en la komunumo*

65. Multaj misaĵoj ene de la teologio kaj de la eklezio estas kaŭzitaj per tio, ke ne estis praktikata *la edukado en la komunumo*.

66. La edukado en la komunumo inkluzivas la *punadon* aŭ ankaŭ *eksigon* de tiaj personoj, kiuj publike enportas en la komunumon nebibliajn instruojn kaj vivkutimojn (1 Korintanoj 5; 2 Johano 9-11).

67. Se la edukado ene de la komunumo estu efika, tiam devas ĝi atingi ĉiujn nivelojn de la eklezia hierarkio (rangordo) kaj eĉ antaŭ la *presbiteroj* de la komunumo, *sinodanoj* kaj ekleziaj *gvidantoj* ne devas halti, kiam la devojigo eliras de ili aŭ de ili ricevas subtenon.

68. Ĉar *„malmulto de fermentaĵo fermentigas la tutan mason“* (1 Korintanoj 5,6) kaj tio validas tiom pli, se tia „fermentaĵo“ signifas personojn sur la influaj pozicioj.

### *Taskigo por la unuopa kredanto*

69. Ĉiu unuopa kredanto estas vokita por praktiki la *„ĝeneralan sacerdotecon“* (komp. 1 Petro 2,9), kaj tio signifas: observi sian mandaton kiel kristano por enketado de la instruo kaj de la vivo surbaze de la Sankta Skribo.

70. Al tio apartenas ankaŭ la taskigo, *kontraŭstari* la spiriton de la tempo kaj ne silenti okaze de la nebibliaj agmanieroj. „Ne per perforto, sed per la vorto“ ni batalas (Marteno Lutero).

71. Ĉiu unuopa kredanto estas invitita pere de *legado de la Biblio* kaj pere de *preĝado* tage resti en ligo kun Dio kaj lasi donaci al si plifortigon kaj plibonigadon.

72. Li estas vokita anonci la *mesaĝon* de Jesuo Kristo tiel, kiel la Biblio ĝin al ni peras, sen limigoj, ellasoj kaj aldonoj.

73. Li estas vokita, la *Biblion* serioze alpreni ankaŭ en ĝiaj etikaj kaj al la tempospirito kontraŭantaj eldiroj kaj laŭ tio vivi.

74. Li estas vokita labori en *vekiga misia komunuma konstruado* resp. ĉe tia kunagi.

75. Li estas vokita, starigi sin malantaŭ la *ekleziaj kunlaborantoj*, kiel ekzemple pastoroj, kiuj pro sia biblifidela, vekiga anoncado ricevas problemojn kun sia eklezia gvidantaro kaj estas de ĝi puŝitaj randen aŭ eksigitaj.

76. Li estas vokita depreni sian subtenon por *monkolektado* kaj *impostigo,* se tio estas utiligata por kontraŭevangeliaj celoj.

77. Li estas vokita kunlabori ĉe *biblifidelaj laboroj*, aranĝoj, lernejoj, akademioj, preslaboroj, radiofoniaj programoj ktp. aŭ ilin subteni.

### *Taskigo por eklezioj*

78. La eklezioj estas vokitaj orientiĝi ekskluzive laŭ la *Biblio* kiel la Dia vorto kaj kontraŭstari ĉian nebiblian instruon kun preteksto tiel atingi multajn unuopulojn kaj en la socio povi peri sian orientiĝon.

79. Ili estas vokitaj, al *misieca komunumkonstruado* ebligi pli da loko ol ĝis nun tio ofte okazis.

80. Ili estas vokitaj por la biblifidelaj *kunlaborantoj*, ekz. pastoroj, certigi ilian agadrajton aŭ ĝin plilarĝigi kaj ne malhelpi ilin per sankcioj aŭ eksigadoj.

81. Ili estas vokitaj ne postuli *devigajn monkolektadojn* por aranĝoj, se la biblifidelaj kristanoj tion en sia konscienco ne povas aprobi.

82. Ili estas vokitaj diri klarajn vortojn pri la etikaj demandoj, ekzemple pri geedzeco kaj familio, pri abortado, eŭtanasio kaj homseksualeco, nome konforme kun la Sankta Skribo, ne kontraŭdire al ĝi.

***Taskigo por la ŝtato kaj socio***

83. La ŝtato ne estas identa kun la eklezio (komp. Johano 18,36). Tamen povas al ĝi nur utili kaj alporti benon, se ĝi observas la *fundamentajn bibliajn mezurojn* kaj ilin postsekvas, kiujn verdire devus al ĝi peri la eklezioj (kio bedaŭrinde en multaj ŝtatoj malofte okazas).

84. Tiaj bazaj bibliaj mezuroj troviĝas precipe en la formo de la *Dekalogo* (2 Moseo 20,2-17).

85. Se tiaj mezuroj ne estas plu prenataj serioze, tiam aperas *kaoso* kaj *anarkio*.

86. Kelkaj sociaj *grupoj* kaj *partioj* en multaj ŝtatoj akcelas kaoson kaj anarkion tiel, ke ili la Diajn reglementojn, troviĝantaj en la Dekalogo, kontraŭbatalas ĉu malfermite ĉu kaŝe.

87. La Sankta Skribo markas tiajn homojn per sekvaj vortoj: *„Sed sciu, ke en la lastaj tagoj venos danĝeraj tempoj. Ĉar homoj estos sinamantaj, monamantaj, fanfaronemaj, arogantaj, insultemaj, malobeemaj al la gepatroj, sendankaj, nesanktaj, neparencamaj, nepacigeblaj, kalumniemaj, nesinregantaj, malmildaj, ne bonamantaj, perfidemaj, pasiemaj, ventoplenaj, plezuron amantaj pli ol Dion; havante ŝajnon de pieco, sed neinte ĝian potencon; de ĉi tiuj ankaŭ vin forturnu. Ĉar el ĉi tiuj estas tiuj, kiuj rampas en domojn, kaj forkaptas malsaĝajn virinojn, ŝarĝitajn de pekoj, forkondukatajn per diversaj voluptoj, ĉiam lernantajn, kaj neniam kapablajn veni al la scio de la vero“* (2 Timoteo 3,1-7).

88. En multaj ŝtatoj tiaj homoj, la antaŭkurantoj de *„la homoj de peko“* (2 Tesalonikanoj 2,3) jam sidas ĉe la ŝaltlevumiloj de la povo aŭ ilin aspiras. Ili ricevas ĉiam pli da influo en la politiko, jurisprudenco, amaskomunikiloj, universitatoj, lernejoj kaj eklezioj.

89. La politikistoj, ĵurnalistoj, instruistoj kaj ekleziaj gvidantoj, kiel ankaŭ la homoj en ĉiuj aliaj profesioj estas vokitaj kontraŭstari tiun „marŝon tra la instituciojn“, tiun enŝteliĝon, pere de *preĝado kaj laboro en la biblia kristana senco*.

***La perspektivo***

90. La nuntempa evoluo en la eklezio kaj socio estas *antaŭdirita* en la Sankta Skribo.

91. Tio markas la tempon, en kiu la kontraŭkristana mondreganto de Satano aperos.

92. Jesuo Kristo tamen venos denove kun potenco kaj gloro kaj li faros finon por la „homo de la peko“ (2 Tesalonikanoj 2,8).

93. Sed ĉar ni ne scias, *kiam* Jesuo denove venos, validas agadi, kiom longe la tago daŭros.

94. Ni agas por Jesuo Kristo kaj por konstrui lian komunumon el *dankemo* por lia substitua sinofero sur la kruco kaj el nia *amo* al li – en certeco, ke venko apartenas al li.

95. *„Tamen la firma fundamento de Dio staras, havante la jenan sigelon: La Sinjoro konas tiujn, kiuj estas liaj, kaj: Foriru de maljusteco ĉiu, kiu nomas la nomon de la Sinjoro“* (2 Timoteo 2,19).

Amen.





***Rimarko***

La novaj „95 tezoj“ estis formulitaj okaze de la 450-a datreveno de la morto de Marteno Lutero (18-an 2-an 1996) de d-ro Lothar Gassmann. En la germane parolanta Eŭropo dum kelkaj semajnoj 33 kristanaj organizaĵoj per sia subskribo anoncis sian konsenton kun ilia enhavo. Okaze de internacia pastora konferenco komence de Marto 1996 ĉe Durban en Sudafriko ili troviĝis tie en iomete modifita formo jam en la angla lingvo. La proksimume mil ĉeestantaj pastoroj kaj ekleziaj gvidantoj el 14 landoj kaj pli ol 50 denominacioj alprenis ilin entuziasme kiel rezolucion kaj decidis ilin traduki en ĉiujn lingvojn kaj ilin distribui en la tutan mondon.

La 27-an 10-an 1996 ili estis – kiel la tezoj de Lutero en la jaro 1517 – sub granda partopreno de la kredantoj surnajlitaj sur la katedralo en Wittenberg kiel la simbola akto kaj alvoko por la konvertiĝo. Post tio ili estis senditaj al ĉiuj episkopoj kaj ekleziaj prezidantoj de Germanio, Aŭstrio kaj Svislando, kune kun la alvoko al disputacio (aperta diskuto) kaj por konfirmado de la misaĵoj en la eklezioj. La surnajlado kaj la referaĵoj de la kun tio ligita berlina kongreso „Reformation heute“ (La reformacio hodiaŭ) estas lingve kaj bilde dokumentitaj en la libro

*„Ruf zur Umkehr. Neue 95 Thesen und die Folgen“* (Alvoko por konvertiĝo. Novaj 95 tezoj kaj la sekvoj), kiel ankaŭ per la filmo *„Reformation heute“* (La reformacio hodiaŭ). La filmo akirebla ĉe d-ro Lothar Gassmann. Okaze de la jarmila turno jam troviĝis tradukoj de la tezoj en minimume 30 lingvoj kaj iliaj publikigoj en pli ol 100 ŝtatoj de la mondo. Kiel brulanta torĉo la novaj 95 tezoj dum mallonga tempo trakuris la teron kaj flamigis la konsciencon de multaj homoj de ĉiuj naciecoj kaj haŭtkoloroj. Antaŭ la eklezia kaj socia situacio komence de la tria jarmilo la mesaĝo estas pli aktuala ol iam ajn.

Esperantigis Vinko Ošlak, Klaŭdiforumo (Klagenfurt / Celovec) 2016